1-a Jaro, N-o 45/46

APERAS S.A.T. SEMAJNE

10. Aŭgusto 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Vivu la kvina Kongreso de SAT!


Gekamaradoj tutmondaj! Alvenis la signifoplenaj tagoj en kiuj potence koncentriĝas kaj publike manifestiĝas la interna kaj la organiza forto de SAT, alvenis la prov- kaj pruvohoroj por la SAT-organismo, alvenis la tagoj de nia Kongreso!

Jam multajn semajnojn vi povis legi en S-ulo la sinsekvajn komunikojn pri nia V-a sennacieca kunvenego, nia SAT-Kongreso en Vieno. Delonge tiu ĉi okazontaĵo jam elradiis siajn lumbrilojn antaŭanoncajn. Vieno — ne tiu tradicia urbo de kolora pompo kaj de gaja ridado kaj de dolĉaj valsoj, kia ĝi vivas en la burĝa memoro, — sed Vieno, la urbo de laboristaj bataloj kaj de organiziĝema proletaro, — estas akceptanta en tiuj ĉi tagoj la gastojn el tuta mondo, la delegitojn de SAT-anaro. Nur modesta nombro da ili povas sekvi la flaman alvokon de l' kongreskomitato, ĉar nur malmultaj sukcesis ŝpari al si la monerojn bezonatajn. Laboristoj malofte havas la favoron, fari vojaĝojn, eĉ nur dum kelkaj tagoj, tute senzorge, tute lukse, ien ajn en la belan mondon (kies beleco ne ŝajnas kreiĝinta por ni). — Kaj tamen kiom necesas, ke laboristoj limojn transpaŝu, iru ekster sian propran denaskan sferon, por rigardi, kia bildo prezentiĝas ekster tiu sfero, kiamaniere vivas laboristgefratoj aliloke, en alia medio, kaj por senti la grandan komunsenton de solidareco, kiu sen iaj lingvaj kaj limaj baroj kunligu tutmondan proletaron, ke ĝi liberiĝu dank' al tiu unueco, dank' al tiu forta solidareco!

La kongreso en Vieno, kiu okazas sub honorprotekto de la Viena Laborista Ĉambro, traktos seriozajn aferojn, gravajn ne nur por la SAT-anoj, kiuj kun streĉita atento sekvos la kongresajn intertraktojn, sed entute por la laborista esperantistaro, ĉu organizita, ĉu ne, kaj — eĉ plie — grava por la proletaro de l' tuta mondo, ĉar de la prospero de nia SAT-organizaĵo, de nia SAT-laboro dependos, klarvideble por ni, la ideologiaj nuancoj (tendencoj al sennaciismo) inter la rondoj de klaskonscia laboristaro, kiuj ricevos des pli fortan impreson, influon kaj efikon, ju pli klare kaj laŭcele evoluas SAT.



Nia kongresejo,
la laborista hejmo en Vieno, XVI.



La salonego, en kiu okazos la kongreskunsidoj.

Kaj ŝajnas al ni, ke pli ol iam ankaŭ la neesperantistaj laboristoj kaj la institucioj de la laborista klaso rigardas al nia kongreso. Parte ili jam spertis la praktikan helpan valoron de nia organizaĵo, parte ili iom ekkomprenetas, ke niaj klopodoj, nia penado estas seriozaj kaj atentindaj.

Ni ne atendas troon de nia V-a kongreso; ni scias, ke nia evoluo ne permesas trorapidiĝon; ni ne iluziiĝas pri maturaj fruktoj, dum ankoraŭ interne de nia aparato regas mankoj kaj malfunkcioj, dum ankoraŭ ni ne estas interne sufiĉe solidiĝintaj, sufiĉe firmigitaj, por facile superi ĉiun krizon. Sed tamen ni scias, ke nia ĉi-jara kongres-laboro, same kiel tiu de la antaŭaj jaroj, ne estas vana, ke la elspezoj faritaj kaj farotaj ne estas senutile forĵetitaj. La periodo inter la lastjara — Brusela — kaj la hodiaŭa — Viena — kongresoj estis eksterordinare plensignifa, ĉar ĝi montris plivastigitan praktikan agadon de SAT sur ĝia speciala kampo, apliko de esperanto por la celoj de batalanta proletaro. Se ni ankoraŭ ne rikoltis la fruktojn de nia agado plenmane ĝis hodiaŭ, tio ne estas kaŭzo por malesperi kaj malkuraĝiĝi. Ni scias, ke sur la vojo nun de ni irata ni povas atingi rezultatojn, kaj estas konvinkitaj, ke nia V-a Kongreso en Vieno plifirmigos dum laborplenaj horoj laŭ sia destino, laŭ sia programo la bazon por daŭrigi estonte eĉ pli efike kaj pli sukcesplene la antaŭenmarŝon.

Tial ni elvokas el plena koro:

Vivu la kvina Kongreso de SAT en Vieno!

N. B.

AL VIENO!

La kvinan fojon, SAT-anoj el plej diversaj mondpartoj kongrese kunvenos.

Kvin jarojn da ekzisto! . . . Tio signifas por organizaĵo vivkapablecon certan.

Kvankam multaj proletesperantistoj ne aliĝis la SAT-movadon, tial ke ili eble ne konas ĝian ekziston, aŭ miskomprenis ĝiajn celon kaj taskojn: malgraŭ plej malfavoraj ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj; malgraŭ manko de sperto ĉe multaj membroj; unuvorte, malgraŭ plej diversaj baroj kaj maloportunaĵoj, ni tamen vivtenis kaj eĉ konsiderinde progresis.

Tia estas la konstato, kiun fari devas ĉiu sincera kaj lojala homo, kiu prikonsideras la nunan staton de nia movado.

Sed estas ankaŭ konstatende, ke SAT povus esti pli forta, pli multanara ol ĝi estas.

Se tute alceleca estas la voj' elektita, ni devas tamen ne malatenti la barojn, kiuj ĝenas nian antaŭeniradon. Necesas ilin forigi aŭ preterpasi.

Esperinde la Viena Kongreso scipovos esplori la situacion kaj difini la plej taŭgajn rimedojn por ebenigi, plilarĝigi la vojon.

Necesas forpeli la nubetojn, kiuj grizumas ĉe la horizonto. Necesas klareco. Necesas fido kaj lojaleco inter la samcelanoj, inter la samilanoj. Necesas toleremo, komprenemo. — Kaj kritikemo pozitiva.

Necesas plie sinforgesemo kaj plena sinsubmetemo al la ĝeneralaj interesoj de la entrepreno.

Al Vieno ni do ĉiuj kunportu la firman deziron labori en frateca spirito, kun varma koro kaj nura intenco antaŭenpuŝi nian aferon. Per nia ekzemplo ni montru al la tutmonda Proletaro modelan bildeton de unueca movado.

Partieca fanatikeco estu for! Vivu unuanimeco, unukoreco SAT-aneca!

E. Lanty

La Ligo de la "Infanamikoj" en Aŭstrio

Ĉe la lulilo de la "Infanamikoj" staris la plej gravaj apostoloj de ĉiu progreso de la homaro: la mizero kaj la entuziasmo. Antaŭ du jardekoj la kapitalisma evolucio en Aŭstrio triumfis. En ĝiaj servoj — kiel ĉie — ĝemis la infanaro de la proletariaro. Instruisto, D-ro Kraus, publikigis statistikon, laŭ kiu infanoj de kvar jaroj spite la leĝoj de la ŝtato servutis ĉiutage sub la jugo de l' kapitalismo. En tiu tempo redaktoro *Anton Afritsch* en Graz kolektis kelkajn infanojn de socialistoj kaj penis, plibeligi al ili la malmultajn horojn de libereco kaj plinobligi iliajn animojn, minacitaj per sklaviĝado. Li kondukis ilin en la ĉirkaŭaĵon de la urbo, vekis en ili la amon al la naturo kaj al la libereco, li alportis sunbrilon en ilian mizeran vivon kaj naskigis en ili la sociajn sentojn, la klasan komprenon.

Malrapide sed ne reteneble oni imitis la bonan ekzemplon en aliaj urboj kaj landoj. La diversaj grupoj sin unuigis al komuna agado. La teruraj okazintaĵoj de la milito devigis la "Infanamikojn" — jen la nomo de la nova organizaĵo — solvi novajn problemojn tre urĝajn. La infanoj de la mizeruloj bezonis helpon materian, sed estis necesege, ke la karaktero de la helpo ne fariĝu fikompato, ĉar tia helpo estus la morto de la klasa konscio. Oni baldaŭ komprenis, ke ne nur estis la demando, batali malsaton, malvarmon kaj nudecon, sed ankaŭ kapabligi la infanojn, fariĝi ĝiatempe plenvaloraj kunbatalantoj de la granda internacia socialista armeo. Tiel paŝo post paŝo la unuiĝo por bonfaro evoluiĝis en unuiĝon por edukado. En 1920 la "Infanamikoj" unuiĝis kun la organizaĵo "Libera Lernejo", kies programo estis antaŭ ĉio la kontrolo de la metodoj en la lernejoj. De tiu ĉi jaro la potenco de la "Libera Lernejo-Infanamikoj" ĉiam progresas kaj jam hodiaŭ ili ludas gravan rolon en la publika vivo de la popolo. — Jen la principoj de la juna organizaĵo:

Anstataŭ bonfaro ĝi metis reciprokan helpon. La gepatraro solidare helpas al sia infanaro. La malinda "mi dankas, mi kisas la manon" — kiu estis ĉiam la fino de la kristnaskaj kaj aliaj festoj por la malriĉuloj — foraperis, la infanoj havas la rajton, kaj en plej alta senco eĉ la devon, amuzi kaj ĝoji.

La grandaj infanoj helpas al la malgrandaj. Ne ekzistas pli pura ĝojo ol vidi, kiel dum ekskurso la "granduloj" prizorgas la pli malfortajn kunulojn. Jen fonto de sociaj sentoj.

La infanoj, kiuj ne havas taŭgan familian vivon, trovas hejmon ĉe la Infanamikoj. La bona uzo de la libera tempo estas ĉefa zorgo de la organizaĵo. Movado en freŝa aero, sporto, komuna ludo, sed ankaŭ serioza instruado, ĉu en muziko, ĉu en lingvoj, kiu ja ekonomie surpaŝas la rimedojn de individuo, estas la benindaj agadoj de la Infanamikoj. Ili zorgas por taŭgaj libroj, fondas bibliotekojn, konstruas ferio-hejmojn ktp. ktp.

Sed ili kun granda sukceso ankaŭ provis, anstataŭigi la ekleziajn festojn, kiuj estas tute fremdaj al infana animo, per aliaj, pli naturaj, en kiuj la infano ne plu estas fividaĵo, ornamaĵo, sed *vivanta centro*. Anstataŭ bigoteco — naiva ĝojo pro naturo, pro saneco, pro juneco. Aŭskultu la impresigan kanton, kiun nia infanaro kantas okaze de la festoj, aranĝitaj de la Infanamikoj: "... kiel bele, ke ni estas junaj!", kaj vi komprenos la esperon de nia k-do Max Winter, nuna estro de la Infanamikoj: "Tiaj infanoj iam estos kapablaj, venkbatali por pli bona kaj pli bela estonteco, ili subigos la kapitalismon." *Otto Simon*.

La Kalafatti[1])

Ĉi-artikolo, kvankam ne respegulanta proletaran vidpunkton al okazaĵoj en Ĉinio, tamen povas interesi niajn legantojn, ĉar ĝi montras, kun kia timego la burĝa mondo rimarkas la signojn de leviĝo kaj liberiĝo en Ĉinio, kaj aliflanke, kun kia indiferenteco la homoj ĝenerale — en nia artikolo la Vienanoj speciale — traktas okazojn de grava historia signifo. Red.

Kiam mi estis infano, oni ankaŭ gvidis min en Prater-on al "Kalafatti". Ekvidinte la ĉinan pupegon, kiu turnis sin ĉirkaŭ propra akso, levis averte kaj remallevis la brakon kun la etendiĝanta montra fingro, — mi kaŝis plore vizaĝon mian en la basko patrina. Sed dumnokte kiam mi kuŝis en lito kaj mia stomako ne povis digesti la kvantegon da frandaĵoj, kiujn sendis dumtage mia frandemo al ĝi, estiĝis timiga febrosonĝo al mi: La Kalafatti, la ĉinego sin movis for de la karuselo kaj renversinte la radegon, kiu ankaŭ troviĝas en Prater, piedpuŝis la sanktan Stefano-katedralon kaj rapidegis tra Vieno al mia domo. Tie li rektiĝis antaŭ lito mia, etendis sian brakon kaj boris poste sian montran fingregon en la stomakon.

Se mi nun estas leginta la vienan gazetaron pri la ĉinaj okazantaĵoj, mi devas pensi senvole al la fuŝdigesta sonĝo en infanaĝo mia.

Ĉinio, la regno kun 400 milionoj da homoj, ha, restis por ni Vienanoj nenio alia ol la "Kalafatti". Por la Vienano la ĉino estas fremd-eksteraĵo vestita per silka robo, posedanta harplektaĵon kaj en karuselo levanta minace la brakon.

Se oni pli akre observas, oni konstatos ke la konformeco inter la Kalafatti-simbolo de l' Vienano kaj la okazantaĵoj en Ĉinio ne estas tiel malpreciza.

Jam unufoje la ĉino levis minace sian brakon. En la jaro 1900 dum la Boksista milito. Tiam oni restis tute trankvila en Vieno kaj konsideris la tuton kiel fremda ĉasekspedicio, kvazaŭ anglo ĉasas tigrojn en Hindio. Dume la plej granda popolo de l' mondo travivis teruregaĵojn.

Ekspluatitaj de anglaj kaj japanaj entreprenistoj, 400 milionoj da homoj vivadis pli malbone ol bestoj; infanoj mortis antaŭtempe pelitaj en fabrikojn, patroj laboraĉis tage kaj nokte kaj ricevis plenmanon da rizo, dum anglaj inĝenieroj konstruis luksajn vilaojn. La karuselo de degenerinta mondo: aŭtomobiloj en ili sidantaj elegantvestitaj "ladys" (sinjorinoj) veturegis ĉirkaŭe, opiokonferenco montris rikanvizaĝaĉon en la sovaĝa turniĝo, mondmilito kaj skismita kaj malpotenca Eŭropo ronddancadis, ... bolŝevista Rusio, — en la mezo staris la ĉinego turnante sin ĉirkaŭ propra akso.

---

1) Estas la nomo de l' posedinto de Viena karuselo en "Prater" — popolamuzejo. La karuselo prezentas en sia mezo grandegan ĉinon, kaj la nomo de l' posedinto transiris tiele al la ĉino, ke multaj vienanoj fakte ne scias, ke la nomo "Kalafatti" devenas de l' posedinto.

Jen abrupte li levis averte la manon. En la eleganta vila-kvartalo "Kiukiang" ordonetis angla policisto strikulojn ĉinajn, ke ili preteriru; kiel angla policisto "admonas" ĉinojn, (kun bastonegbatoj). Jen eksplodis. La policisto estis mortbatita, la "ruĝa koko" staris sur tegmentoj, la blankhaŭtaj sinjorinoj rifuĝis, tranĉiloj flugis aeren, anglaj maŝinpafiloj ekfunkciis kaj pezaj ŝippafilegoj ekaŭdigis muĝe siajn melodiaĉojn.

Sed la 400 milionpopolo rampis el siaj malvastaj domaĉoj, sur barikadoj de mortuloj restaris ĉiam novaj batalantoj kaj en la "Times" (angla gazeto) aperis ĉiutage raportoj. La situo en Ĉinio ĉiam pli serioziĝas, kaj en "Wallstreet" la borsinformoj ŝanĝperdis.

Sed la Vienano legante la raporton oscedas kaj gvidas sian knabon posttagmeze al "Kalafatti".

Kiel tuŝas lin Ĉinio?

Jes, certe, kiel koncernas nin Ĉinio? Se ni antaŭ 20 jaroj estus zorgintaj, kiamaniere tie vivadas tiom da homoj, eble ni nuntempe ne devus timi, ke la granda ĉino (Kalafatti), kiu ĝis nun ĉiam levis averte la manon, unufoje sin liberigas kaj piedpuŝante kaj detruante venos al iu kaj boros la montrofingron en la brustkaveton. Ĉar ĉifoje ŝajnas fariĝi el sonĝo — sanga realeco.

Tradukis el "Mateno" (29. junio 1925)
Stephi Müller, Wien (2351).

Pri Crouch kaj Trumbull

Paul Crouch kaj Valter Trumbull, la usonaj soldatoj kiuj estis kondamnitaj ĉe kazerno Schofield (legu Ŝofield) proksime al Honolulu, Hawaii, atingis Alkatras-fortikaĵon en Kalifornio. La du herooj de klasbatalo forlasis Hawaii la 26an de junio celante la supre nomatan kazernon disciplinigan, kie ili estos punlaborigataj.

Paul Crouch, antaŭ ol li forlasis Hawaii, diris al reprezentanto de "The Daily Worker": "Dume en Alkatras ni estos studantaj kaj preparantaj nin, ĉiurimede, al pli efikeca servado por la Afero de la laborista klaso por ke ni povu uzi tiun ĉi sciakiraĵon post nia liberiĝo."

Parolante pri artikolo en Winston-Salem N. C. (Norda Karolino-ŝtato) ĵurnalo, titolita "Kompato por juna Crouch", nia esperantista kamarado diris antaŭ ol li enŝipiĝis, "Mi ne havas sufiĉan vortscikonon por priskribi tiujn kiuj oferas 'kompaton' por iu kiu malestimas favorkorecon de la kapitalista klaso."

"Kiam ajn laborulo postulas sian rajton, la posedecon de la produktiloj kaj la riĉaĵaron kiun li produktis, li ricevas 'malseverecon'".

Crouch kaj Trumbull estis militkondamnitaj pro nura atesto de spiono armea, kies atestaĵo estis pruvita kiel falsa de la defend-advokatoj. La verdikto estis decidita post malpli ol duonhora konsiliĝo, kaj la procesrekordo estis ŝanĝdifektita de la arme-estraro.

Kolektita de Ĝ. S. Nov-Jorko.

Moskvo, la 22. de julio 1925.

Al Tutmondaj Laboristoj Esperantistoj.

Karaj Kamaradoj!

Hodiaŭ, post la granda manifestado de la unuecfronta laborista solidareco, okazinta sur la Ruĝa Placo en Moskvo pro la vizito al Sovet-Unio de la sveda kaj germana laboristaj delegacioj, ni sendas al vi niajn fratajn salutojn.

Kunveninte en malgranda amika rondo, ni priparolis la hodiaŭajn taskojn de nia laborista Esperanto-movado kaj, alte takstante la grandan valoron de SAT por la proletaria Esperanto-movado kaj ankaŭ por la tutmonda proletariaro, ni kune kun la saluto sendas al ĉiuj Vi nian varman alvokon:

Zorgante pri plibonigo kaj perfektigo de la propagandinstruaj aparatoj de la enlandaj laboristaj Esperantoasocioj, ni samtempe zorgu pri plua kreskigo de nia praktik-serva aparato per nia SAT!

Ĉiu laborista esperantisto, kiu povas pagi kotizon al SAT — aliĝu al ĝi! Kaj kiuj ne povas — tiuj kuniĝu kaj aliĝu al SAT kiel kolektiva subtenanta membro. Nia mizera situacio ne estu baro por subteni SAT: kio ne estas farebla individue, tio estu farita kolektive.

Vivu esperanto, servanta al la proletariaro!

Vivu Sennacieca Asocio Tutmonda!

Willi Bennewitz, 2378, Chemnitz, Germanio
Arthur Söder, Matfors, Svedio
John Lindholm, Kramfors, Svedio
Gustav Östling, 4504, Ludvila, Svedio
John Nilsson, 4057, Bromölla, Svedio
N. Nekrasov, 1520, Moskvo
B. Breslaŭ, 1894, Moskvo
N. Temerin, 1153, Moskvo
G. Demidjuk, 1516, Moskvo
Polanski, Moskvo
A. Kalaŝnikov, Ĉita, Siberio.

Manifestado de Tutmonda Laborista Unueco

22. de julio okaze de la vizito de germana kaj sveda laboristaj delegacioj al Sovet-Unio, en Moskvo estis organizita granda mitingo kun partopreno de la delegitoj. Ĉirkaŭ 100 000 laboristoj kunvenis sur la Ruĝa Placo, antaŭ la tombo de Lenin, por saluti la alilandajn laboristajn gastojn. Ĉiuj paroladoj, plifortigataj per multnombraj laŭtparoliloj, estis penetritaj per sincera celado al starigo de internacia unueco laborista spite la klopodojn de burĝaro, pri la tuta mensogo de kies asertoj kaj blufoj konvinkiĝis la alvenintaj delegitoj. Granda entuziasmo regis la kunvenintan laboristan amason. Kiam post fino de la mitingo la delegitoj estis forveturantaj de la placo, ĉiu klopodis premi adiaŭe kaj salute iliajn manojn kaj . . . samtempe konvinkiĝi propraspertĕ, ke ili estas efektive la frate-kalozaj laboristaj manoj.

Notinde estas, ke inter 58 germaniaj delegitoj estas 2 posedantaj Esperanton, kaj inter 300 svedaj delegitoj — 8 esperantistaj kameradoj. En Moskvo, same kiel en Leningrad, ili estis priservataj per tradukado de niaj SAT-kamaradoj. Kaj eĉ kelkafoje la delegitoj-neesperantistoj konvinkiĝis, ke Esperanto servas plej perfekte por la traduka servo; la propaganda signifo de tio estis klare rimarkebla.

Post la manifestado kelkaj esperantistaj kamaradoj, Moskvaj kaj alilandaj kunvenis por pasigi kune kelkajn horojn. K-doj Bennewitz (Chemnitz) kaj Demidjuk (Moskvo) parolis pri SAT-movado kaj pri neceso de ĝia subteno flanke de enlandaj laboristaj esperanto-asocioj.

Ni esprimu la deziron ke similaj renkontiĝoj de laboristoj diverslandaj okazu kiel eble plej ofte; ili kreskigas la senton de laborista solidareco kaj unueco internaciaj, ili pligrandigas ankaŭ la bezonon de lingvo internacia. *Moskva SAT-informo.*

TRA LA KLASBATALO

Japana gazeto *Asaki Asaĥa,* havanta ĉirkaŭ 1 500 000 abonantojn, por manifesti ligon inter oriento kaj okcidento entreprenas flugadon de du aeroplanoj el Japanio tra Sibirio kaj Moskvo al Parizo. El Francio ili ŝipe revenos hejmen. La sciigo en Irkutsk estis ricevita per esperanta korespondanto tri monatojn antaŭ ol estis ricevita oficiala telegrafa sciigo de aŭtoritatoj. *M. K.*

Ĉinoj, kiuj loĝas en diversaj urboj de Sovetio (precipe en orienta Sibirio) oferas monon por subteni strikantojn de Ĉinio. Ĉinia konsulo de urbo *Ĉito* (orienta Sibirio) telegrafas, ke por ĉiuj strikantoj en Ĉinio ĉiumonate nun estas bezonaj ĉirkaŭ 3000000 rubloj. La strikantoj ĝis nun montras sin kuraĝaj kaj senhezitaj. *M. K.*

Ĉinia registaro kreis specialan komisionon por esplori financojn de l' regno. La komisiono post longa laboro konstatis, ke tuta financa sistemo de Ĉinio bezonas reformon radikalan, ke impostoj estas tro altaj, ke diversaj provincestroj kontraŭleĝe uzas regnajn sumojn por siaj apartemaj armeoj, ke nacia industrio ne estas finance helpata. *Enspezoj de regna buĝeto egalas 459 960 136 dolarojn, elspezoj — 566 496 260 dolarojn. Ĉiuj internaj kaj eksteraj ŝuldoj = 1634 000 000 dolarojn. M. K.*

La rifkabiloj preparas novan ofensivon ankaŭ kontraŭ la hispana fronto.

Minlaborista konferenco en Paris akceptis i. a. rezolucion pri la ekonomia krizo kaj minacanta striko en Britio. La germanaj delegitoj malkonsentis je internacibaza ĝenerala striko.

Senlaboruloj en Britio estis 20. julio 1 221 900 (t. e. 180 116 pli ol en sama semajno de antaŭjaro).

Ne hezitu aboni al SENNACIULO, la sola semajna gazeto laborista en esperanto!

Pri sanitaraj institucioj en Palestino

El la institucioj, kiujn la cionista loĝantaro de l' lando mem kreis kaj subtenas, plej citinda estas la "Kupath Cholim", la malsanula asekuro, fondita de l' ĝenerala laborista organizaĵo hebrea. Ĉi-asekuro funkcias preskaŭ ekskluzive per la kotizado de siaj membroj [1]) kaj la membronombro ĉiam pligrandiĝas, ĉar ne nur laboristoj, instruistoj sed oficistoj ŝtataj kaj privataj aliĝas. La kuracistoj estas dungitoj de l' asekuro kaj konsistas el kuracistoj deĵorantaj nur ĉe la asekuro kaj specialaj kuracistoj. La aliloke kutima malsimpatio inter kuracistoj kaj ceteraj dungitoj malestas ĉi tie. La medicinan mastrumadon estras kuracisto. La kunlaboro inter medicinaj kaj nemedicinaj dungitoj okazas senkonflikte. La asekuro ankaŭ eldonas propran ĵurnalon "Briuth Haoved" (laborista higieno) kiu okupiĝas pri la diversaj temoj de l' asekuraj aferoj, publika, — industria higieno kaj en kiu kunverkas medicinfakaj kaj mastrumteknikaj oficistoj. Dume la "Haddassah" — asekuro plejparte koncentrigas sian agadon al urboj kaj nur dissendas kelkajn kuracistojn en la plej imponajn koloniojn; la asekuro "Kubath Cholim" precipe surprenis la taskon de kontraŭmalsana protekto al terkulturaj laboristoj, enmeze de la terkulturejoj; krom siaj ambulatorioj en la urboj ĝi posedas boninstalitan hospitalon en Ain Charod, kiu servas kiel centra malsanulejo al ĉiuj terkulturaj komunumoj lokitaj sur la Jesreel-ebenaĵo; estas konstruita 1 laborista ripozejo en Mozah, la konstruo de 2. ripozejo sur monto "Karmel" apud Haifa estas komencota. La laboristaro rilate al la farendaĵoj estas tute memstara. Ĉi tie ankoraŭ ekzistas nenia laborista protektleĝaro, invalidec-kaj akcidentleĝaro. Pro la evoluanta industriiĝo de l' lando ĉi-supro fariĝas necesaĵo. Flanke de l' registaro jam leĝo estis preparata. Se la laboristaro ne mem estus helpinta sin, la laboristo okaze de malsaniĝo hodiaŭ estus tute senhelpa. Komparante la mortstatistikon oni konsciiĝas, ke ili (la sanit. institucioj) por la plej granda parto de l' jaro sufiĉas por ĉiaj postuloj, ke kontraŭe je la fino de l' somero kaj je komenco de l' pluva periodo, kiam la intest-infektoj kaj malarioj amasiĝas, okazas superpleniĝo de l' hospitaloj. Konsiderinde estas, ke pro cirkonstancoj ĉi tieaj la hospitalflegado jam necesiĝas ĉe pli malgravaj malsanoj; parto de l' laboristoj el la plej novaj kolonioj loĝas en barakoj kaj tendoj. Se la enmigro samrapide daŭros kiel lastatempe (pli ol 200 homoj pomonate), tiam evidentiĝos por la venontaj jaroj pligrandigo de l' sanit. institucioj. Verŝajne estas, ke pro nuna ekonomia evoluo kaj loĝantara kresko ankaŭ la institucioj de l' lando ampleksiĝos.

Ĉar en la plej oftaj okazoj la kuracistoj ne venis pro ekonomiaj, sed naciaj motivoj, laŭŝajne ankaŭ kelke da tempo pro konstanta alveno de kuracistoj bezono da ili ne estis, la lando havis ekzemple pli da specialistoj ol la aliaj landoj de l' antaŭa Oriento, kiel Sirio, Egipto. Tamen pro la rapida evoluo de l' lando ekestis ŝanĝo. Spite relative alta kuracistnombro ne ekzistas ĉi tie senlaboraj kuracistoj kaj dum daŭro de l' evoluo oni supozeble ankoraŭ bezonos ekzamenitajn specialkuracistojn.

Laŭ „Der Arb. Samariter" trad. SAT 1019.

1) La jarbuĝeto estas 32000 egiptaj funtoj.

El Angola

Laborkondiĉoj de Indiĝenoj

Angola — la portugala kolonio el sudokcidenta Afriko — estas lando, kiu vivas, laŭ ekonomia vidpunkto, en tre primitiva stato. La industrio preskaŭ malestas aŭ ekzistas nur en sia infanaĝo. Krom la fiŝa (kaptado kaj preparado) kaj la kansukera industrioj, okupantaj kelkajn milojn da laboristoj, oni nur trovas senvalorajn kaj senfortajn provojn de industrientreprenoj. Oni faras kelkajn objektojn el diversspecaj fibroj, preparas viandojn kaj aliajn manĝeblajn konservaĵojn, produktas iajn konstrumaterialojn kaj tabakaĵojn (cigaredoj, cigaroj kaj s.), eltiras diversajn industrioleojn, sed ĉi-ĉio nur en tre malgranda skalo. Eĉ la minindustrio, kiu povus esti tre grava se la portugalaj kapitalistoj ne tiom stulte timetus la uzadon de siaj kapitaloj en tiuj ne tuj profitdonaj entreprenoj, estas preskaŭ nula. En la grundo de Angola-kolonio troviĝas ja multaj kaj abundaj minaĵoj: fero, kupro, karbo, petrolo, oro, arĝento, diamantoj, k. a. sed, verdire, nur la diamantoj estas sufiĉe bone esplorataj kaj konstituas unu el la plej grandaj riĉaĵoj el Angola (kompreneble, nur en la manoj de kelkaj portugalaj kaj alilandaj kapitalistoj, kiuj laŭkutime demetas siajn patriotajn vualojn antaŭ la pordo de la monkaso).

La terkulturado konsistigas, kune kun la komerco, la preskaŭ ekskluzivan — almenaŭ la precipan — okupon de l' Angolanoj, ĉu de blankrasulaj kapitalistoj, ĉu de la malriĉaj indiĝenoj.

La normalaj okupoj de la indiĝenoj estas ja la terkulturado kaj la bestbredado. Esceptinte tiujn, kiuj loĝas en la urboj kaj gravaj urbetoj, la indiĝeno posedas ĉiam terpeceton, kiun li mem kulturas helpite de siaj edzinoj kaj infanoj, kaj el kiu li deprenas siajn vivsubtenaĵojn samkiel ti-kiujn li devas vendi por pagi la impostojn, kiujn la ŝtato de li postulas.

Per tre primitivaj metodoj, ĝenerale sinservante nur per la "katana" (longa kaj larĝa tranĉilego), per malgranda hakilo kaj, speciale, per la manoj, li kulturas la tielnomatajn malriĉajn specojn, nome, maizon (milion), manihoton (mandjoko), pataton, "ĵinguba"n (arakidon [1]) kaj paŝtigas sian brutaron en la vastegaj naturherbejoj.

Li travivus tiamaniere sufiĉe trankvilan, kvankam tre simplan kaj ofte sovaĝegan vivadon, se la *superegaj* interesoj de l' kapitalistaj uzurpantoj ne postulus lian brakon por la esplorado de siaj "fazenda"j aŭ "granĵa"j (grandskalaj kulturkampoj), por la funkciigo de siaj fabrikoj aŭ uzinoj kaj por ĉiuspecaj nekvalifikitaj laborbranĉoj.

En tio kuŝas la plej senhonta ekspluatado de l' kompatindaj indiĝenoj, plej grava fonto de riĉeco de l' koloniaj kapitalistoj.

La trafiko de genigruloj, nome la sklaveco, estis leĝe malpermesata jam de jaro 1836, sed la aktualaj laborkondiĉoj perforte truditaj al indiĝenoj konstituas novan formon de maskita sklavigo.

Inter pli ol 6 milionoj da personoj loĝantaj en la 1,260,000 kvadrataj kilometroj konstituantaj la Angola'an teritorion, eble ne pli ol 100,000 [2]) estas eŭropanoj, blankrasuloj. El ĉi lastaj, la plejgrandparto, preskaŭ la tutaĵo, estas ĉu komercistoj aŭ terposedegantoj, ĉu ŝtatoficistoj.

Konsekvence, la laboristaro devas esti serĉata inter la indiĝenoj sen kiuj la disvolviĝo de koloniaj entreprenoj kapitalistaj restus absolute nula.

El tiu aserto ĉiu povus konkludi ke la indiĝenoj, multe serĉataj kaj nedispenseblaj, devas esti bone salajrataj kaj zorge traktataj.

Ne! Tute ne! La bone konata bronza leĝo restas neaplikebla en ĉi-kazo. Kontraŭ tio zorgas la registaro, ĉiam kaj ĉie montriĝanta la plej konfidaj komizoj de la grandega firmo Kapitalo, Financo & Imperiismo.

Diversaj leĝoj estis publikigitaj en Angola por reguligi la rekrutadon de indiĝenaj laboristoj. Ili ĉiuj bazas sur ĉi-principoj:

1) La indiĝeno estas devigata labori ĉe iu ajn mastro, kiu postulas liajn servojn por iu ajn laboro.

2) Esceptoj estas difinitaj nur por: a) riĉaj posedantoj; b) indiĝenoj akirantaj pere de sia mema laboro (???) aŭ de aliuloj "multon pli ol ili bezonas" kaj vivantaj dank' al tiuj profitoj en materiaj kondiĉoj de komforto sin diferencigantaj el tiuj de la ceteraj indiĝenoj; c) indiĝenoj sin okupantaj je mar-, dom- aŭ oficejoservoj.

El la laste publikigita "Regularo por la Rekrutigo kaj Dungado de Indiĝenaj Laboristoj" mi ĉerpas la ĉi-suban materialon.

Ĝis fino de jaro 1924 la rekrutigo de indiĝenaj laboristoj, escepte por ŝtatoservado, nome publikaj konstruaĵoj, fervojoj, komunikiloj k. t. p., estis farita helpe de perantoj-rekrutigistoj, kiuj okupiĝis ekskluzive je tiu malnobla metio, noveforma trafiko de "gudrokapuloj" — malestima nomo, kiun ili mem donis al la mizeregaj indiĝenoj.

Ĉiu terkulturisto aŭ industriisto bezonanta kelkajn brakojn adresis sin al tiuj perantoj, kiuj ricevis sufiĉe grandan pagon po ĉiu rekrutigita indiĝeno.

1) Ternukso.
2) La ekzaktan ciferon mi ne scias ĉar mi ne ankoraŭ trovis bonan statistikon pri loĝantaro de Angola.

La rekrutiganto havis ĉiun helpon de la lokaj aŭtoritatuloj kaj "sendis" al rekviziciinto la koncernajn indiĝenojn inter vicoj da soldatoj ĉar, ĝenerale, nur perforte li povis ricevi ilin.

Laŭ la lasta regularo tiu metio estas malpermesata kaj la rekrutigo estas farata senpere de la lokaj aŭtoritatuloj, al kiuj la mastroj devas adresi siajn rekviziciojn, sed per tio la malnobla ekspluatado, kiu estis farita super la kapoj de la indiĝenoj, nur transpasis de tiuj privataj perantoj al la nun oficialaj aŭ al la delegacioj, kiujn la mastroj persone aŭ pere de siaj asocioj devas, laŭ la sama regularo, krei en la lokoj de rekrutigo.

Laŭleĝe, la lokaj aŭtoritatoj devas fari kolektivan kontrakton al ĉiu grupo de indiĝenoj marŝantaj per privata aŭ ŝtata servado.

Tiu kontrakto ja estas *ĉiam* farata, sed ĝi restas nur porforma, ĉar ĝi *neniam* estas plenumata eĉ ankaŭ ĉe la ŝtatservistoj.

Cetere la dungita indiĝeno ne estas informata pri la laborloko nek pri la speco de laboro, kiun oni postulas de li. Li devas forlasi sian familion, siajn kampojn, sian brutaron kaj kunsekvi siajn samsortulojn ĝis la loko de sia sklavigo, plurfoje piedmarŝante dum kelkcentoj de kilometroj.

Pri kontrakto li nenion konas, eble eĉ ne scias, kion tio signifas.

Laŭ la tempservo ekzistas diversaj specoj de kontraktoj:

a) 4 aŭ 6 monatoj por la indiĝenoj, kiuj devas servi en la "cirkunskripcio [1]) en kiu ili normale loĝas;

b) 6 monatoj kiam ili devas labori en alia "cirkunskripcio" aŭ en alia distrikto, se la vojaĝo de la loko de koncentriĝo ĝis la laborloko (vojaĝo, kiu ne estas enkalkulita en la kontraktotempo) daŭras malpli ol ok tagojn;

c) 8 monatoj se tiu vojaĝo devas daŭri inter ok kaj dekkvin tagoj.

d) 10 monatoj, kiam la laboristoj devas uzi la marvojon, aŭ kiam la vojaĝo surtere ne povas esti farata dum malpli ol dekkvin tagoj.

Post la finiĝo de siaj kontraktoj la indiĝeno devas esti rekondukitaj, ĉiuj elspezoj je konto de la dungisto, inkluzive la nutrado, en la lokon de sia deveno kaj nur povas esti denove kontraktataj por la sama aŭ por alia mastro, kiam pasis tempo egala al tiu de iliaj antaŭaj kontraktoj.

Tiuj klaŭzoj koncernantaj la tempdaŭron de la kontraktoj kaj la ripozon de la laboristoj, nur malofte estas plenumataj. Mi mem konas kelkajn indiĝenojn "kontraktitajn" por labori dum 6 monatoj en ŝtata oficejo en Loanda, kiuj restas je la servo de tiu oficejo depost 15 (dekkvin!) monatoj sen ke oni pensas pri ilia anstataŭigo.

La nuna salajro de tiuj laboristoj, laŭleĝe difinita, estas 0,80 eskudo potage — ĝuste la afrankoprezo de letero por eksterlando, $^{2}/_{100}$ (du centonoj) de l' meza salajro de kvalifikita laboristo (eŭropano) — sed ĉi-mizeregan pagon ili neniam ricevas entute.

En la laborloko — tion postulas la koncerna regularo — la indiĝenoj ricevas ĉiusemajne po $^{1}/_{5}$ de ilia salajro, t. e. dufoje 2,40 eskudojn [1]) ĉiumonate. La ceterajn $^{4}/_{5}$, post dekalkulo de 80 eskudoj por pagi la imposton [2]) ili devas ricevi en la loko de sia deveno post la kontraktfiniĝo, kio, tamen, nur tre malofte okazas. Alveninte en sia "sanzala" [3]) la indiĝeno ricevas *kiel pagon* por sia multmonata laboro, nur kelkajn eskudojn aŭ 2—3 kokinojn, 1 porkon aŭ pecon da drapo, sed tre ofte ... nenion. La mizeruloj ne scias fari kalkulojn kaj, do, povas esti senhonte forrabataj. Kaj se, iom sagacaj, ili protestas ĉe la aŭtoritatuloj, ili riskas esti arestitaj aŭ per vipo forpelitaj.

La indiĝenaj infanoj ambaŭseksaj povas esti dungitaj nur kiam iliaj patro aŭ patrino kunestas. Ili ricevas (?) samkondiĉe kiel la aĝuloj salajron de 0,24 esk. kaj povas labori nur 6 horojn potage (???).

La labortago por la aĝuloj ambaŭseksaj estas 9-hora. Nenecese estus diri ke la indiĝenoj laboras tiom da horoj, kiom iliaj mastroj postulas, ĉu dumtage aŭ dumnokte, malgraŭ tio, ke la regularo tion parte malpermesas, speciale koncerne la virinojn kaj geinfanojn.

Krom la salajro, la mastroj estas devigataj doni al siaj dungitoj nutradon kaj vestaĵon.

Mi ĉerpas el la regularo la indikojn pri kvanto de nutraĵoj, kiujn la mastroj devas are disdoni al siaj laboristoj por ke tiuj mem ilin kuiru laŭ siaj gusto kaj moroj:

800—1000 gr. potage da "fuba" [4]), faruno, rizo, fazeolo aŭ simila nutraĵo. 250 gr. potage da freŝa viando aŭ fiŝo aŭ 150 gr. da samaj sekigitaj aŭ salitaj fiŝo aŭ viando. Palmoleo kaj salo, respektive 50 gr. kaj 30 gr. potage.

Laŭ la regularo, la nutraĵoj disdonitaj al indiĝenaj laboristoj devas esti el plej bona kvalito kaj en bona stato. Tamen, ĉu en la kvanto, ĉu en la kvalito, ili estas ĉiam forrabataj ne nur ĉe la privatuloj, sed ankaŭ ĉe la ŝtato mem. La komercistoj vendas kaj publike anoncas "specialajn *por nigruloj* nutraĵovarojn" (ĝenerale putriĝantaj).

La vestaĵoj disdonotaj de la mastroj nombras respektive:

a) Por la indiĝenoj "kontraktitaj" por 3 aŭ 4 monatoj en la "cirkunskripcio": 1 drapo [1]) aŭ pantalono kaj 1 ĉemizo, kamizolo aŭ vesto;

b) Rekrutigitaj por 6 monatoj: samon kiel por la antaŭaj kaj plue 1 kotona litokovrilo (utilas rimarki ke la indiĝenoj neniam dormas surlite);

c) Kontraktitaj por 8 aŭ 10 monatoj: 1 kotona litokovrilo, 1 vestaĵo (pantalono aŭ pantaloneto kaj bluzo aŭ vesto) por uzado dum la laboro kaj 1 vestaĵo (drapo aŭ pantalono kaj ĉemizo, kamizolo aŭ vesto) post finiĝo de la kontrakto.

En Loanda, ekzemple, ĉe la Fervojo (ŝtata entrepreno) oni povas ofte vidi multe da indiĝenaj laboristoj kovritaj nur per malgranda peco de kruda felto aŭ de malpura ĉifonita sako ...

La mastroj estas ankaŭ devigataj doni loĝejon kaj kuracadon al siaj laboristoj eĉ kiam la malsano estis akirita ekster la laboro.

El ĉiuj kondiĉoj de l' kontrakto ĉi-lasta estas, ja, la plej bone plenumata. Spite tio, multaj indiĝenoj mortas pro manko de la necesaj zorgoj. Oni konsideras la mizerulojn kiel bestoj kaj kiel tiaj ili estas kuracataj.

Male la klaŭzoj koncernantaj la loĝadon de la indiĝenoj estas unu el la malplej respektataj. En la plimulto de l' kazoj ili devas kuŝi surgrunde aŭ loĝiĝas en infektaj barakoj, kiujn ili mem konstruas per kelkaj arbobranĉoj kovritaj per sekaj herboj.

— — — — — — — — — — — —

Jen, detale priskribitaj, la normalaj laborkondiĉoj de indiĝenoj en Angola.

Sed en multe pli malbonaj kondiĉoj laboras la indiĝenoj, kiuj estas rekviziciitaj per publikaj laboroj en la "cirkunskripcioj", nome konstruo aŭ riparado de publikaj vojoj k. s.

Ĉi-indiĝenoj estas devigataj al laboro sen salajro kaj ofte ankaŭ sen nutrado, sed preskaŭ ĉiam kun la devo alporti mem siajn laborilojn.

Por fini mi ĉerpas el intervjuo kun la prezidanto de la Asocio de Komercistoj el Malanĵe, publikita en ĵurnalo el Loanda, la jenajn periodojn:

"— Sed, ni parolu ankoraŭ pri la kaŭzoj de la malriĉiĝo de l' distrikto. Tre malbonan politikon oni sekvas ĉi-tie depost ĉirkaŭ du jaroj, kiu povas esti resumata jene: devigi la nigrulon konstrui turistajn vojojn per siaj propraj laboriloj (kiuj kostas al ili tro multe), ne permesi ke li faru siajn kulturojn ĉar oni ne donas al li la sufiĉan tempon por tio, ne doni al ili la ripozon ne nur por la rekonstruado de ilia agrikulturo, sed ankaŭ por progresigi ilian brutaron. Kial do oni postulas de ili la imposton de 80 esk. kaj oni konstante rekrutigas novajn gentojn por enriĉigi aliajn distriktojn? Kaj mi jam ne parolas pri la servoj liveritaj de

---

[1]) Administra landa subdivido.

[1]) Por pli bona kompreno mi indikas tion, kion oni povas aĉeti per *tuta monatsalajro* de indiĝena laboristo — 4,80 esk.: 3 cigaredpaketoj (60 cigaredoj) kaj 1 alumetskatolo, aŭ 1,200 gramoj da rizo, aŭ 2,400 gr. da terpomoj aŭ da fazeoloj, aŭ 2 kiloj da maizpano.

[2]) La ŝtato postulas de ĉiu indiĝena viro la pagadon de ĉiujara imposto kies nuna sumo estas 80 esk. La tielnomata "indiĝena imposto" signifas la plej gravan enspezon de la kolonio.

[3]) Indiĝena vilaĝo.

[4]) "Fuba" estas speciala faruno je tre malagrabla gusto akirita per la pistado de la maizo aŭ de la manihoto post kelktaga infuzo en varma aŭ fluanta akvo respektive per la maizograjno aŭ la manihota tubero.

[1]) La indiĝenoj, speciale la virinoj, tre ofte vestiĝas per nura granda drapo, kiu kunvolvas ilian korpon dumtage kaj ilin kovras dumnokte.

ili al la ŝtato, kies salajro ne estas pagata, kiel antaŭnelonge okazis rilate al iaj grupoj de indiĝenoj.

"— Tio estas tute eksterorda! . . . Vera perforto! . . ."

" — Ĉu el tio konsistas la civilizigo de la indiĝeno? Ĉu en tio resumiĝas la firmigo de la distrikto? La poseduloj respondu . . ."

— — — — — — — — — — —

"Se en la plataĵo (t. e. la plataĵo, kiu okupas preskaŭ la tutan distrikton Malanĵe) estas agadkampo por ĉiuj iniciativoj kaj energioj, kial do permesi ke ĝia loĝantaro estu deturnata en regionojn tute diferencajn laŭ klimato kaj nutrado, el kio rezultas ĝia malfortiĝo, nur pro tiuj kiuj mortas, je pli ol 40 %??? Kaj malfeliĉe estas nenia kontrolo super la mastroj, kiuj dungas la mizerulojn, el kiuj la plejgrandnombro revenas (kiam tio okazas) skeletaj kaj kovritaj per vundoj!

"Kiu antaŭ kelkaj jaroj travojaĝis la regionojn Songo kaj Ĵinga, trovis multajn "sanzala"jn tre popolhavaj kaj riĉaj je bestoj kaj kulturkampoj; nune ili estas ĉagrenigaj por tiuj, kiuj konis ilin ĉar oni nur trovas herbejojn kaj signojn montrantajn ke tiuj "sanzala"oj ekzistis iam! La nuraj loĝantoj troveblaj estas maljunuloj kaj skeletaj infanoj! Krimo kontraŭhoma, kiu meritas la koncernan punon!"

— — — — — — — — — — —

Komentarioj estas nenecesaj.

La ĉi-supraj vortoj en buŝo de burĝuloterposedanto, kvankam ili respegulas liajn vundatingitajn interesojn, estas multe pli elokventaj ol ĉiuj frazoj forglitantaj el mia mallerta plumo. *J. P. B.*

El Nederlanda Indio

Tiel nomata Nederlanda Indio estas gravega enspezfonto de Nederlandaj kapitalistoj. Milionojn da guldenoj ĝi ĉiujare havigas al ili. La indiĝenoj jes vivas en mizeraj cirkonstancoj, sed tio ne gravas. Gravas nur la mono. Ke ĝi regule alfluu Nederlanden estas la ĉefafero. Kaj tiuj, kiuj revoluciigas la indiĝenojn, kiuj proklamas "Indio for de Nederlando" kaj "Indio al la indiĝenoj" estas kompreneble ĉiurimede kontraŭataj kaj persekutataj.

Unue oni ekzilis la Nederlandajn propagandistojn Sneevliet kaj Bergsma. Venis novaj enlandaj agitantoj Tan Malakka, Semaoen k. a. Ankaŭ ĉi lastajn oni ekzilis. Kaj nun estas ĉiu, kiu nur iomete propagandas komunismon, trafata de la mano de la registaro.

Komunistoj Poeradisastra kaj Dahlan estis kondamnataj al monpuno aŭ malliberejo pro disdono de flugfolio.

Kaporalo Monkarang estis eksigata el la armeo pro tio, ke li komunistan gazeton, kiun li estis ricevinta de iu, transdonis al kamarado.

La komunisto Zainoedin ekzilita al Koepang (Timor) estis, ĉar komunista gazeto en Semarang komencis protestagitadon kontraŭ la ĉefulo de Timor, pli malproksimen sendata al Mui.

En la garnizono Meester Cornelis estis eksigataj 2 soldatoj kaj poste ankoraŭ 7, ankaŭ 1 en Bandoeng. En Tjinahi oni eksigis kaporalon kaj pri kelkaj soldatoj en Pontianak estas la akuzo ankoraŭ en esploro. Ĉi ĉiuj eksigoj okazis pro "okupo pri komunismo".

Pro artikolo "La registaro kaj Tan Malakka" estis la Soedan'a partiorgano "Soerapati" konfiskata. Bedaŭre por la konfiskantoj oni trovis nur 18 ekzemplerojn.

La ĉefstabejo de la armeo elsendis cirkuleron per kiu ĝi malpermesas, ke soldatoj, iliaj familianoj aŭ iliaj geservistoj (!) estu membroj de revoluciaj societoj. Ankaŭ estas malpermesite viziti la kunvenojn de tiaj societoj.

Per tiaj rimedoj Nederlanda kapitalismo klopodas konservi siajn poziciojn en Indio.

Kompilis 670.

Inter ni

— Komparo ne estas argumento.

— Estas vere, sed komparo helpas klarigi, komprenigi argumenton. Tial mi unue faru komparon.

En la meblista fako, ekzemple, estas diversaj subfakoj, en kiuj la teknikaj procedoj uzataj diferencas inter si. Seĝofaristo ne laboras samprocede kiel ŝrankofaristo. Ebenisto [1] kaj menuzisto [1] ne aplikas saman laborprocedon.

Okazas iafoje, ke meblisto iras de iu subfako en alian. Tiam li emas enkonduki la procedojn, kiujn li kutimis apliki en la forlasita fako. Kaj li fuŝlaboras. Li do devas unue lerni novajn procedojn, novan labormetodon.

Simile okazas en SAT.

La revolucia movado povas esti konsiderata kiel granda fako; la diversaj partioj kaj organizaĵoj kiel subfakoj.

Nu, SAT-on konsistigas elementoj, devenantaj el ĉiuj subfakoj. Sekve, tiuj subfakanoj emas enkonduki en la Asocio siajn apartecojn. Kaj tio okazigas kelkfoje konfuzon kaj mistrafon.

Samkiel metiisto, transirinta de iu fako en alian, devas unue lerni novan laborprocedon, same en SAT ni ĉiuj devas akiri satecan agadmanieron, satecan spiritostaton.

SAT ne havas kiel taskon politike agitadi. Sekve, kiu partianece politikas en nia Asocio, tiu same fuŝagadas kiel ebenisto, kiu volas apliki sian laborprocedon en la konstrulignaĵista fako.

En SAT ni agu satane. Aliel ni agus nur diable, detrue. Iuelie.

[1] Meblofaristo tute ne difinus la specon de laboro, kiun faras ebenisto. La samon oni povas diri pri la vorto lignaĵisto, rilate al menuzisto. La vortoj ebenisto, menuzisto estas same necesaj kiel ĉarpentisto, kiu estas oficiala. Ĉarpentisto ankaŭ estas lignaĵisto.

PETRO

vojaĝas tra la mondo! Ĉu vi jam konas lin?

D I S K U T E J O

Kaj tamen ĝi estas urĝe necesa!

Ĉe multaj k-doj, kiuj tralegis la artikolon de k-do Demidjuk "Unuecforma aŭ unuecspirita movado?" restis ankoraŭ malpli da duboj ol antaŭe pri tio ke la unuecformo de l'movado estas laŭdinda, tiu unuecformo, kiu ebligos finfine krei unuecan spiriton.

K-do Demidjuk en la plejparto de l'artikolo sia tiom varmege, arde, konvinkite kaj profund-sincere pledas por la tezoj, kiujn ni tuŝis, ke finfine tute malmultaj k-doj komprenas, kial k-do Demidjuk "hezitus levi la manon" por la reformproponoj. Ni, iuj el la proponintoj, kore dankas k-don Demidjuk por tia "kontraŭbatalo". Sed ĉar ne ĉio en lia artikolo estas sufiĉe klara, ni penos fari kelkajn korektojn kaj aldonojn.

Kie embrias la propono pri unuecforma organizo?

— Tute ne nur en la sukcesoj de SAT! Ho, tute ne, ĉar aliel la propono estus *provizore* malnecesa. Se SAT *sufiĉe* sukcesus, ni havus plenan rajton atendi pacience ĝis kiam ĉiuj mem alvenos sen niaj petoj al SAT.

Sed bedaŭrinde la afero aspektis al ni tute aliforme. SAT prosperas plibone ol kiu ajn proleta mondlingva organizaĵo. Kaj tial ĝi, nur ĝi, povas esti la kerno de nia kreota unueca organizo.

Sed ĝi ne estas tiom forta, kiom ni tion dezirus. Kaj tial la propono ankaŭ embrias en tio, ke **SAT ne sukcesas tiom, kiom ĝi indas pro sia grandega utileco!**

Ja ankaŭ la aperon de semajna "Sennaciulo" elvokis ne nur niaj *sukcesoj*. Ĝin elvokis, pli ol ĉio, la *kruda neceseco*. Kaj la samo, k-doj, elvokas nun urĝan necesecon de l'reformo.

SAT estas plej bonega aparato, plej taŭga maŝino. Sed ĝi ne havas sufiĉe da "hejtaĵo" kaj ne sufiĉe da laboristoj ĉe ĝi por pli bone funkcii. SAT similas bonegan muelejon, kiu kun grandega peno laboras ĉar la akvokanalo, kiu devus movigi ĝiajn radojn, fluas en diversajn flankojn, kaj senrezulte sekiĝas kaj perdiĝas.

La poresperanta kanalo nur tiam bone antaŭenpuŝos la evoluon de nia asocio, kiam ĝi fluas al unu direkto, kiam ĝi estas unuecforma.

Aliel plue estos *manuskriptoj* kaj mankos legantoj — libroaĉetantoj. Estas *gazeto*, sed malsufiĉe da abonantoj. Estas *kooperativo* sed malmulte da akciuloj. La efektivigon (realan, ne surpaperan) de nia Tutmonda *Inform-Servo* ni prokrastas de tag' al tago, ktp. — ktp. — ktp.

Ni ripetas, parolante sincere: la situacio ne estas tiom "roza" por ke ni rajtu diri "ĉio iru plue, kiel iris ĝis nun!" Ni ne estu rutinuloj. Esti bonaj SAT-anoj — signifas bone ekkoni la situon de l'asocio kaj peni plibonigi ĝin.

Jen k-do E. L. en iu recenzo ("S." n-o 39) konsideras, ke estas pli celkon-

forme labori per la servoj de SAT, ol "proponaĉi neefektivigeblaĵojn". La konsidero estas tre trafa. Ni treege ĝojas se *en Francio estas sufiĉe havi la libreton, recenzitan de k-do E. L., por konvinki ĉiujn pri la gravaj ecoj* de esp-o kaj SAT.

Sed, bedaŭrinde, ne ĉie estas la samo. Ekz. en Sovetio la libreto de k-do Boubou droniĝus inter centoj da aliaj similkarakteraj verkoj kaj neniu eblus kompreni, kial dokumentaro, kompilita per esp-o, estas pli valora ol kiu ajn alia. Diversaj k-doj el Okcidenta kaj Meza Eŭropo per heroecaj agoj permesis al la asocio elkreski kaj komenci normalan agadon, sed "Sennaciulo" kaj la dekkvino de SAT-eldonaĵoj, aperigitaj *dum pli ol 3 jaroj,* elvokas ĉi-tie ofte ridetojn.

Se al iu el ni subite alvenus la ideo kompili dokumentaron pri la funkciado de lab. universitatoj, pri vivkondiĉoj de konstrulaboristoj aŭ, ekzemple, pri evoluo de revolucia movado en malproksima lando, ni kolektos nur treege malkompletajn, malriĉenhavajn, do maltaŭgajn kaj neutilajn materialojn. Redakcio de revuo "Raboĉij Klub" ("Laborista Klubo", Ĥarkov) bonvenige kaj kompleze proponis siajn paĝojn al la verkontoj de artikoloj pri laboristaj kluboj, univ-toj ktp. — Ĉu multiuj uzis tian bonan okazon?

K-doj penis enketi pri laboro de komunistinfanaj org-ĵoj, pri poresperantaj rezolucioj voĉdonitaj de ruĝulaj organizaĵoj, kaj cet. temoj. — Ĉu ili multe sukcesis?

Iam, malofte, gazetredakcioj akceptas ĉi-tie tradukaĵojn el "S-lo". — Sed kiel ili aspektas, presitaj apude de 8, 12, 16-paĝaj artikoloj, tradukitaj el angla, germana k. a. nacilingvoj?

* * *

— Ĉu ni estas pesimistoj?

— Ho, tute ne! Sed ni konstatas ke SAT estas bonega vagonaro kun tro malmulte da pasaĝeroj, kaj tio malhelpas al ĝi rapide atingi la altan celon!

Kaj nome tial, kun malĝojo en koro, oni devas "kritiki kaj proponaĉi". Oni devas "proponaĉi" por ke SAT elvoku ne nur, jen aprobajn, jen mokajn, ridetojn.

Se la *varba,* la "esperantist-iga" laboro plue evoluos, kiel ĝis nun [1]), ni povos nur plue aprobi la rekomendaĵojn de k-do E. L., sed . . . nenion fari realan.

— Do jen, k-doj, embrias la propono!

Kion oni ne forgesu

En sia artikolo k-do Dem. nesufiĉe atentas la fakton ke la propagand-asocioj konsistus nur el *propagandistoj* kaj kursgvidantoj, ke tie kuŝus la *faka* principo. Li eĉ ne provis taksi kiom tio estas grava por ĉiu, kiu celas al "movado sen purepropagandaj organizaĵoj".

K-do Dem. konsideras ke okazos simpla "algluado de SAT-matrikuloj" al novebakotaj SAT-anoj. Li treege ŝatas la edukivan valoron de SAT-ismo, sed forgesas, ke la nove bakotaj SAT-anoj *vole — nevole* devas — en la vicoj de SAT — iom aliiĝi ideologie. Ja la edukiva laboro estos ankoraŭ pli trafa kiam estos pli da membroj, do pli da rimedoj por antaŭen puŝi la eduk-laboron.

Oni nun *mekanike* ne povas atenti SAT tiom, kiom decas, ĉar la land-asocio estas separata organismo. Tial, en Germanio, Ĉekio, Svedio, oni apenaŭ refutas la mensogajn dirojn pri tio, ke SAT estas "bolŝevika" organizaĵo. —

Kaj, finfine, la propagando estas lama. Mi scias urbojn, kie estas multege da esp. kursoj (laboristaj), multe da ellernintoj la lingvon, sed kie oni preskaŭ ne mendas esp. librojn (de SAT) kaj nesufiĉe abonas SAT-organojn.

Plue, estas eraro pensi ke SAT-sekcio estos pli persekutata ol revoluciema land-asocio (?) — Por eviti persekutojn, ni ne fondu klasbatalemajn unuiĝojn!

Ĉu tion-ĉi proponas k-do Demidjuk?

Nia movado estu unuecforma!

Efektive, estis malmulte farita el tio, kion ebligas fari SAT sed tio estas kaj estos natura, se nia laboro ne estos sufiĉe larĝskala.

La fina konkludo de multaj k-doj nature sekvas el iliaj oportunistaj konsideroj: lasi ĉion mem evolui plue kaj atendi ke iom post iom SAT per "reala utilo logu proletajn esp-istojn" al si.

Sed ni, male, deklaras ke SAT por allogi devas multe kaj trafe labori, por labori ĝi bezonas multoble pli da k-doj en siaj vicoj ol ĝi havas. Tiujn plifortigajn rezervojn donos al ni la reformo. SAT pli allogece funkcios se la tuta revoluc. esp-ista familio troviĝos sub unu standardo.

La reformo ne estas tiom valora pro la esp-istoj (ne tro multaj), kiujn ĝi alvenigos el la land-asocioj, kiom pro tio, ke ĝi donos organizmanieron, kiu faros eĉ la propagandon "peresperanta", ĝi plifortigos la "praktikecon" de l' movado. Anstataŭ longa vojo: kurso — landasocio — SAT, estos tute mallonga: kurso + SAT. T. e. la lernanto devos laŭeble komenci sian praktikan laboron, eĉ ĝis la fino de l' lerno-kurso.

La reformo ne estas tiom terura, kia priskribas ĝin kelkaj k-doj. La Kremenĉugaj grupoj, sendintaj proponon al Viena Kongreso, montris vojon, uzeblan en multaj lokoj. Al la reformo oni povas aliri *laŭgrade, ne subite.* Komence oni povas nur starigi favorajn kondiĉojn por SAT-laboro kaj SAT-anoj.

La afero estas serioza! Ĝi postulas urĝan decidon pri la vojo sekvenda! Tial ni esperas ke la SAT-kongreso kaj la speciala konferenco en Vieno el reprezentantoj de land-asocioj tion bone komprenos kaj direktos la movadon sur relojn, pliproksimigantajn la celon!

I. Avrunin (1122). *V. Kolĉinski.*

[1]) Tiaj sukcesoj estas enviindaj por idistoj (ili faras nenian praktikan laboron) sed por ni ili malsufiĉas.

Konsideroj pri organizo de tutmonda Esperantista movado proletara

La idearo de k-doj Kolĉinski kaj 2921 ne estas nova. Ĝi jam batalis antaŭ kaj post fondiĝo de SAT por sia efektiviĝo. Atentinda estas fakto, ke la ideo pri unuigo de ambaŭ movadoj en unuecaĵo disvastiĝis, firmiĝis plej forte en landoj kun respektinda poresperanta organizaĵo. Tio do pruvas, ke kresko de movado nia postulas novan organizon. La vivpovecon de ĉi-ideo atestas la ekstaro de pluaj probatalantoj, malgraŭ iamaj ĉesis labori sur ĉi tiu kampo. Plue denove, kiel iam, k-doj pledas por pluenekzisto de dualisma movado nuna, ekz. k-do Demidjuk, kiu rekomendas ĝin unuecspiritigi. Laŭ opinio de kamarado D. unuformigo de la movado estas danĝera pro tio, ĉar en iuj landoj regas, regos blanka teroro kaj malpermeso de SAT. Ĉu do SAT estas persekutata pro sia nomo? Certe ne! Sed pro sia tendenco kaj spirito. Se ni unuecspiritigas la movadon — kio cetere jam estas praktikata — la porvarbaj asocioj estas sampersekutataj kiel SAT. Oni eĉ spertis, ke sufiĉis Esperanto-insigno aŭ parolo, por esti kaptita de kapitalista servistaro. Sekve porvarba organizaĵo SAT-spiriteca devas labori same nelegale en la trafitaj landoj kiel tieaj SAT-membroj. Krome oni ja povus esceptigi koncernajn landojn ĝis pli oportuna tempo. Pro tio ne gravas tiu argumento kontraŭ unuformeco de Lab. Esp. movado.

Estas dirite, ni SAT-anigu ĉiun laboristan Esperantiston! Per tio solviĝos la afero tute aŭtomate. Bone! Sed pli facile dirita ol farita. Por efektivigi ĉi sendube bonan proponon, estas nepre necese, antaŭe estigi la bazon por la ebliĝo. Ĉu ne la Kvara plimalbonigis la bazon eksigante multajn k-dojn el SAT? Ĉu ne aniĝo al I. L. H. malhelpas SAT-membrecon al socialdemokrataj k-doj en Germanio? Verŝajne la malpermesa decido rilate al membreco al I. L. H. de Germana Socialdemokrata Partio ne jam estas ĉie konata. Certe iuj k-doj socialdemokrataj estas membroj de SAT. Tamen multaj eksiĝis aŭ ne aniĝas pro tiu decido. Ili samagas kiel ankaŭ alitendencaj k-doj dirantaj: "Unue mi estas partiano kaj due SAT-ano-Esperantisto." Ĉi-tendenco ne estas ŝatinda, ĉar ĝi eĉ povas danĝerigi SAT-on. Entute la aniĝo al I. L. H. estis nebontaktika kaj krome ne rekomendinda pro aliaj kialoj.

Ĉefa kondiĉo por kunigi ĉiujn Lab. Esperantistojn revoluciemajn, estas demokrateco en la tuta organizo. Malgraŭ ke SAT havas referendumon kaj individuecan bazon, ĝi tamen ne povas pretendi esti organizaĵo bazanta sur plendemokratio. Por la lastan efektivigi necesas aliformiĝo de ĝiaj organoj, ĉar la konsisto de ili ne konformas la partitendencojn en la asocio. Aŭ ĉu iu pruvas malon? Ĉu povas esti alie!? Pripensu la estigon kaj estiĝon de ĝiaj organoj! Ekzemple la D. K. formiĝas

per stranga maniero. Kanditatoj sin mem proponas, kaj se dumjare ne sufiĉe da ili prezentiĝas, la E. K. admonas kaj atendas pluan jaron. Kiam fine la kanditatnombro pliiĝas, oni komunikas: "Baldaŭ ni fermos la liston".

Post kelkaj semajnoj denova komuniko: "Ĉar la voĉdoniloj jam estis presitaj kiam alvenis novaj deklaroj, kelkaj kandidatoj devas rezigni ĉi-foje." Strange estas, ke E. K. ne fiksis limtempon. Tiu ĉi malfaro certe kulpas la prokraston de la baloto.

Nun pri la baloto mem. Estas ĉies devo voĉdoni ankaŭ por la kandidatoj de la sektoroj aliaj. Se prezentiĝas sola kandidato en ĉiu sektoro, la konfidema k-do simple voĉdonas por la ofte nekonataj kandidatoj. Pligraviĝas la afero, se anoncis sin du aŭ pli da k-doj. Kiun elekti? La k-doj embarasiĝas per tio. Elekti nekonatojn seninteresigas la baloton, kion elmontras la antaŭlasta baloto kaj tre verŝajne ankaŭ la lasta. Nuna balotsistemo estas aliigenda. Oni konsideru jam faritajn proponojn. Se ne eblas apliki iun pli seriozan sistemon en ĉiuj sektoroj, oni nunteme nur praktiku ĝin en sektoroj kun sufiĉe multe da membroj.

Leginte la diversajn proponojn, mi devas konstati, ke oni ne tre atentis la financan problemon. Ĝi estas eĉ la plej grava. Certe multaj k-doj ne aniĝas pro monmanko kaj pro tio nur estas membro de la porvarba asocio. Se proletoj devus elspezi monon sole por Esp. organizaĵoj, la financa atribuo al kulturmovado ne estus granda. Sed estas ja multaj organizaĵoj postulantaj kotizon de proleto, kaj en ĉiu oni plendas pri monmanko. Konsiderenda krome estas la ĉiea plimizeriĝo de laborularo. Neniam antaŭe la proletaro estis tiom ekspluatata kiel nun.

Tial eĉ ne iom aliiĝos la kriza stato nuna de Lab. Esp.-movado, se oni ne sufiĉe konsideras la financan problemon. La nura enfakigo de porvarbaj asocioj en SAT ne sole donos solvon. Do oni samtempe plisimpligu la porvarbajn aparatojn metante ilin sur koopera bazo, por ke financa atribuo de la k-doj fariĝu malpli granda.

Jen konciza konsidero pri organizo de ambaŭ movadoj en unu organizaĵo. — La kadro estu SAT bazanta sur sektoroj. SAT-laboro estu plenumata per fakoj. Tute indiferente, ĉu ili havas porvarban aŭ porpraktikan karakteron. Ĉar ja ankaŭ la unuaj laboras por SAT, edukante novajn SAT-anojn kaj estigante peresperantan fundamenton por SAT.

En nia mondasocio estu duspecaj kooperativoj: peresperanta por ĉiuj SAT-anoj kaj poresperantaj por lingvaj regionoj. La lastaj transprenu krome taskon de vendo de eldonaĵoj peresperantaj.

Ĉiu fako rajtas eldoni presorganon rilatantan al sia celo faka, dum "S-ulo" estu kiel ĝis nun informilo pri okazintaĵoj tutmondaj. Nuna D. K. estu aliformigita tiel, ke krom ĉiu sektoro ankaŭ ĉiu fako havu reprezentanton. Baloto okazu por du jaroj. Sektoro havanta pli ol 50 membrojn elektu en si kaj sole por la koncerna sektoro la estron. Komisiono, kiu estu respondeca pri la enhavo de "S-ulo", estu starigita. Ĝi respegulu la en SAT estantajn partitendencojn.

Plua komisiono elektu kaj decidu kune kun koncerna organo pri eldonotaj verkoj.

Konsiderante la fakton, ke laŭ nuna formiĝo de kongreso, ĝi nur estas kunvenintaro favorita de cirkonstancoj, ankaŭ la proponoj neaprobitaj de ĝi, estu voĉdonataj de tuta Satanaro.

En E. K. estu reprezentanto de porvarba fako de la sideja lando.

Jen la ĉefaj trajtoj, kiujn devas havi nia asocio por unuigi en si ambaŭ movadojn, la per- kaj poresperantan. Do oni donu al SAT plej larĝe demokratian bazon por esti la kolekta baseno de ĉiuj revoluciemuloj, kaj ĉiuj partitendencoj en ĝi estu rigardataj egalece kaj serioze.

Senheredigito.

Gajni povus nur la tria . . .

K-do Kolĉinski donis tezon: poresp-a kaj peresp-a laboro nunamomente ne estas disigeblaj. K-do Sproeck tiun tezon abrobas plene. Sed la praktikaj proponoj de k-do Sproeck estas tute malaj al tiuj de k-do Kolĉinski kvankam ili ambaŭ sin bazas sur la sama tezo. Kial tio okazas? Tre simple — ĉar ili ambaŭ forgesas, ke kvankam poresp-a kaj peresp-a laboro povas esti plenumata de unu persono, sed per diversaj rimedoj, per diversaj aparatoj: — propagando kaj instruado — per propagande-instrua aparato (landa aŭ lingvregiona, ĉar propagando okazas en la lingvo de varbato), kaj praktika utiligo de la lingvo — per praktikserva aparato (asocio internacia, ĉar la praktikado okazas internaci-skale). La ambaŭ reformemuloj zorgas kunigi tiujn aparatojn, sed ĉiu siavoje.

En la skalo enlanda mi forte kontraŭstaris projekton de k-do Kolĉinski. Mi ne estas ĉarmita ankaŭ per la projekto de k-do Sproeck, eĉ pli — mire mi legis lian artikolon, en kiu ĉiu linio demaskas la veran intencon de l' aŭtoro, sufiĉe ruze kaŝatan per la argumentado de . . propra senforteco antaŭ la reala vivo.

K-do Sproeck atakas sennaciismon, malkaŝe nomante ĝin nur bela teorio nerealigebla; sed kelkajn liniojn pli malsupre li mem konfesas, ke *jam nun okazas praktikado de frateco internacia-sennacieca.* Sekve lia atako trafas preter la ideon de sennaciismo; kaj jen li direktas siajn sagojn kontraŭ la sennaciecajn organizprincipojn de SAT, konkrete — kontraŭ la sektor-sistemon. K-do Sproeck diras ke ĝi ekzistas nur por elekti sektor*estrojn*. Tiu aserto proksimas al la vero, sed fuŝas ĝin — neniu k-do estas elektata en SAT por gvidi sian sektoron. La vero estas, ke "ni starigis tiun sistemon *nur* por malhelpi ke la gvidantoj de SAT (ne de sektoroj! G. D.) reprezentu ian naciecon". (E. Lanty, Senn. Revuo, n-o 2, novembro 1923, pĝ. 2) — kaj efektive ne pli ol nur por tio, k-do Sproeck. Ne pli ol nur por havi sendependan de kromaj organismoj kaj de ajnaj fetiĉoj gvidkomitaton de SAT, ne pli ol nur por fari la gvidadon de nia Asocio vere demokratia!

Kaj fakte *nur* tiun demokratian gvidsistemon de SAT atakas k-do Sproeck. Kritikante k-don Kolĉinski, li diras, ke projektataj de la lasta propagandaj fakoj „*ne havus rajton en la gvidado* de la tutmonda organizacio. Tamen *tutprave ili povas postuli tiun rajton*". Jen kie estas la kaŭzo! Kulpas ne la sennaciismo, ne la "tabu"-sektoroj, — kulpas nur tio, ke SAT-anoj mem gvidas sian Asocion kaj ne lasas gvidi ĝin al aliaj organizaĵoj. Oni volas nur tion, ke SAT-anoj el la *gvidantoj* de sia Asocio transformiĝu en la *gvidatojn,* ne pli! Ĉar ja la projektata de k-do Sproeck "internacia ligo ne pli ne malpli plenumas ol nun plenumas SAT".

— Ni konsentu pri la principo, la detalojn ni poste ellaboros, — diras k-do Sproeck. Sed la detaloj ne malpli gravas, ĉar la detaloj ofte karakterizas la principon mem. Kiel praktike povus aspekti la projektaĵo de k-do Sproeck? Du vojoj ebliĝas — aŭ SAT restas ti-kia ĝi estas, konservante la individuan membrokotizon, laŭnome fariĝante internacio de landaj organizaĵoj, kaj konsekvence ĝian gvidkomitaton elektos la landaj organizaĵoj; aŭ SAT — kiel praktikserva aparato, estos finance konstruita sur procentaj depagoj el la kotizsumoj de landaj organizaĵoj. Sed lastokaze ĝia financa bazo estos mizera kaj ĝi ne kapablos eldoni eĉ jarlibron, sekve ĝi estos senpova en praktikado de la servoj. Tiun duan vojon eĉ la burĝa movado flankenlasis, konservinte financan memstarecon de UEA (kaj ankaŭ ĝian internan gvidadon, k-do Sproeck!). Konsentu, k-doj, ke la detaloj ja tre gravas. Kaj eble tial silentas pri ili k-do Sproeck, ke ili senmaskigus antaŭtempe la verajn celojn de l' reformo.

Kiam peridea argumentado ne efikas — oni komencas argumenti per bastono. Verŝajne k-do Sproeck mem ne estis certa pri konvinkivo de siaj argumentoj, se li en la fino de l' artikolo prenas tian bastonon, timigante nin, ke se SAT ne zorgos ke internacia ligo okazu kun ĝi, do tia internacio formiĝos spite SAT . . . Kaj mem vi ne timas, k-do Sproeck? Ja batali kontraŭ la vivo estas malfacile kaj la vivo . . nu, ĝi estas nun tia, ke post unu internacio tuj emos aperi la alia, tuj poste la tria, kompreneble ĉiu kun sia propra numero. Lasi sin subigi antaŭ la vivo — estas tre facile — fondi apud unu tutmonda organizaĵo alian estas ankaŭ facile, sed kiu ĝojos pro tio? Tiu kiu delonge metis por si la devizon: dividi kaj regi. Ridos ĝi — la burĝaro!

Diversvojanoj kvankam, ni tamen celas ĉiuj la samon — la socialismon. Kaj la socialismo estas tia kolektivo, en kiu ĉiu membro kapablos kaj povos aperigi maksimumon de sia individua forto kaj kapablo. Kolektivo vivas kaj progresas

per agemo, per aktiveco de ĝin formantaj individuoj. Ĉu intence, ĉu senintence, sed la projekto de k-do Sproeck celas forpreni tiun aktivecon. Anstataŭ organizita laborista maso, internacie, sennacieceaganta, ĝi celas meti kelkajn reprezentantojn, kiuj agus je la nomo de tiu maso. Ne, mi ne estas ĉarmita de via projekto, k-do Sproeck. Mi ne volas, ke gajnu la tria! *G. Dem.*

Ni envicigu!

Kial ekzistas Laboristaj Esperanto-Asocioj laŭ lingvoregionoj?

Unue ni respondu tiun demandon! "Esperanto estas lingvo, per kiu la proletario sukcesos forigi la lingvajn barojn, per kiu ĝi kapablos pli vivigi la senton pri tutmonda solidareco kaj per kiu ĝi efikplene kontraŭbatali povas ŝovinismon. Esperanto servu al la proletariaro!" Tiaj estis la ideoj troveblaj en la protokoloj de la unuaj Laboristaj E-grupoj jam antaŭ la ekzisto de SAT. La samaj motivoj fondigis la pluajn grupojn. En la unua jardeko de la dudeka jarcento ekzistis nur malmultaj L.E.-grupoj kaj inter ilia anaro la plej multaj estis nur Esperantanoj, ne jam Esperantistoj. Avide ili serĉis la okazon interrilati kun samcelanoj. La cirkonstancoj nur ebligis tion en limigitaj regionoj. Por plifortigi la vicojn, por reciproke pli entuziasmigi, por ekzerci la lingvon kaj por la komuna propagando kaj reciproka helpo ili kontaktiĝis kaj — estiĝis asocioj en la koncernaj landoj aŭ lingvoregionoj. Ĉu ili pravis? Ĉu sub tiamaj cirkonstancoj alia formo estus garantianta pli da fruktoj? La spiritaj interligiloj estis la dulingvaj gazetoj kaj ili plenumis ĉiurilate siajn devojn: per propagandaj artikoloj nacilingvaj, per raportoj pri la progreso de la E-movado ili varbis novajn anojn kaj fideligis la simpatiulojn, per ekzerciloj en Esp. kaj pritraktaĵoj de lingvodemandoj ili helpis al kursgvidanto samkiel al la kursano kaj interesulo; krom tio ili donis per korespondaj anguloj la eblecon por korespondado kaj praktika utiligado de Esp-o. Ĉu fari pli estis eble por la tiamaj pioniroj?

Kiam la Esperantanoj fariĝis Esperantistoj

pli kaj pli da k-doj praktike uzis korespondante, eĉ vojaĝante, la lingvon kun samideanoj ekster la gepatra lingva regiono. La fundamento por gazeto *nur* en Esperanto ekzistis. La "Internacia Socia Revuo" pritraktis la proletariajn demandojn kaj estis la spirita ligilo por ili. Gek-doj! Legu nur unu numeron de ĝi kaj vi konvinkiĝos ĝoje, ke jam antaŭ ni pioniroj de nia movado same entuziasme kaj energie laboris por nia celo kaj samvigle kruciĝis la pensoj en "ISR" vivigante la movadon. La deziro renkonti dum kongreso por fondi oficiale tutmondan ligon, pli kaj pli fortiĝis kaj estris la pensojn. Venis la milito preskaŭ ĉion detruanta.

La postmilita situacio

montris la bildon, ke la tuta movado trakuris, se ankaŭ pli rapide, la infanecan staton. El simpatiuloj fariĝis Esperantanoj, el Esperantanoj fariĝis Esperantistoj varbantaj novajn anojn. Por siaj laboroj kaj celadoj ili plej efike uzis la samajn rimedojn kiel la pioniroj antaŭ ili. La politikaj cirkonstancoj helpis al ili. La "ISR" reviviĝis, sed tro frue mortis. Kial? eble pro tro frua reviviĝo. Nun la k-doj atentis la tiaman asocion "Liberiga Stelo". Ĝi akiris membrojn, ĝia gazeto "Laborista Esperantisto" abonantojn kaj kunlaborantojn. Intertempe la mondlingva ideo trakuris venke novajn landojn kaj rondojn. La novaj adeptoj de ĝi trovis okupante sin pri Esp. kelkajn gazetojn, asociojn helpemajn kaj en landoj, kie ekfloris la E-movado unuafoje, la unuaj pioniroj nur povis uzi por sia propra servo la gazeton nur en E. skribitan. Tiuj k-doj aniĝis al la tutmonda asocio provante poste fondi propagandan asocion en siaj lingvoregionoj aŭ speciale kunigante la asocianojn por tiu celo.

Vidu Francujon, Svedujon, Ruslandon ktp. Ili fondis dulingvajn gazetojn kaj eldonis naçilingvajn propagandilojn. Tion ili nur sukcesis per kunigo de siaj fortoj spiritaj kaj financaj. Ĉu ili ne pravis? Ĉu alia vojo estus kondukinta en samaj situacioj pli rapide kaj pli sukcese al nia celo?

En Praha 1921 dum Aŭgusto

unuafoje renkontis en la kadro de la Universala Kongreso laboristaj Esperantistoj, speciale la anoj de "Liberiga Stelo". La cirkonstancoj ne jam ebligis, ke ĉiu asocio povis sendi delegiton aŭ eĉ nur skribe esprimi sian opinion. Tial la kongreso ne povas esti nomata la unua oficiala kunveno de la asocioj. Kunvenis nur k-doj kiuj kapablis pagi la vojaĝon aŭ kiuj apartenis al grupo paginta al ili la veturkostojn. (Inter ili ankaŭ mi por München). La rezulto de la viglaj debatoj estis la fondo de SAT anstataŭ "Liberiga Stelo". Kaj tie jam estiĝis la demando, ĉu SAT estu nur asocio utiliganta nur Esperanton aŭ ĉu ĝi estu ankaŭ la centro por la proletaria esp-a movado, tiel envicigonta la ĝisnunajn asociojn, kaj plenumu iliajn taskojn per oficialaj fakoj. Ke tia kongreso ne povis montri veran bildon pri la opinio de la k-doj, estas klare videble, kiam oni atentas la cirkonstancojn tiamajn, ke la tuta proletaria esp-a movado estis tro juna haj ĝia anaro konsistis el Esperantistoj junaj kaj maljunaj kaj politike organizitaj en diversaj partioj aŭ indiferentaj por tiaj demandoj. Sed malgraŭ tio SAT ekzistis, estis fondita kaj la gazeto "SR" portis la novan ideon kune kun la membroj en la vicojn de la Esperantanoj. La fondintoj de SAT estis ja la funkciuloj en la koncernaj lingvaj asocioj kaj plej bone kapablis influi tiujn por SAT. Ili rigardis SAT, kvankam ne oficiale fondita, kiel la solan asocion por la tutmonda esp-a movado proletaria.

Kia estas la nuna stato?

La asocioj laŭ lingvoregionoj daŭrigis plenumi siajn devojn. SAT funkciis sur la tutmonda skalo. Estis parte reciproka kompletiĝo. La tiel nomataj porvarbaj asocioj estis ĝis nun la vivofonto por SAT. Sed venas situacio kiam la ekzisto de du Asocioj Laboristaj Esperantistaj por unu lando ne plu necesas, eĉ malutilas al la tuta movado. Ŝajne, ke ni jam atingis tiun ĉi staton.

Kial? Kelkaj opinias, ke por siaj celoj ne estas necese esti membro de SAT, aliaj inverse. En la naturo de lingvo internacia kuŝas la ideo: Unu lingvo — unu asocio, kaj SAT enhavas tiun ideon. La aliaj asocioj laŭ miaj spertoj ĝis nun estis pretaj envicigi sin, kiam SAT garantias la plenumon de iliaj taskoj per oficialaj fakoj. Ekzistas nur kelkaj landoj, kie la politika situacio ne konsilas tion. (Ni scias kiaj!)

Kial unuigita movado estas ankoraŭ problemo?

1. La proletaria esp-a movado estis ankoraŭ tro juna kaj okupis siajn pionirojn pri la plej urĝaj laboroj: "Disvastigadi la ideon pri mondlingvo, instruadi kaj doni eblecon je praktika utiligado."
2. Por la malnovaj pioniroj de la movado estas indiferente, ĉu ili plenumas tiujn laborojn kaj devojn per du aŭ per unuigita asocioj, kiam la sukceso estas la sama.
3. La situacio en ĉiu lando estis ĝis nun tiom diferenca, ke estis pli preferinde doni al ĉiu liberan agkapablon en organizaj aferoj.
4. Kelkaj k-doj deziris prokrasti la solvon de la problemo ĝis kiam ĝi estos solvata per la oficiala akcepto kaj apliko de la laboristaj partioj, sindikatoj kaj unuiĝoj.
5. Kelkaj rigardis ĝin de sia politika vidpunkto kaj traktas ĝin nur tiel, kiel ĝi plej utilus por sia propra partio.
6. Unuj opinias, ke ĝi estu asocio kunigante nur la asociojn laŭ lingvoregionoj (k-do Sproeck), aliaj ke ĝi estu individua kiel SAT nun, ignorante la asociojn (Lanty) kaj aliaj kunigi ambaŭ kaj organizi ĝin laŭ tiuj postuloj (mi).
7. SAT kulpis ĉefe pro tio, ke ĝi ne sufiĉe akcentis, ke la anoj samtempe plenumu siajn devojn en la porvarbaj asocioj; ke SAT ne serĉis ĝis nun kontakton kun la koncernaj asocioj por solvi la problemon malgraŭ ke ĝi jam ricevis tiajn proponojn.

Vojo kuniganta

irebla por ĉiuj ŝajnas malfacile trovebla, sed malgraŭ tio la situacio jam tiom klariĝis, ke ni venas al la decida loko. Mi devas konfesi, ke por mi persone estas indiferente, ĉu mi faras la laborojn en la kadro de du aŭ de unu asocioj, pli ja utilas la spirito, kiun ni donas al movado; mi rigardas nur la aferon de la flanko: kiel ni plej sukcese servas al la tuta movado, kiel ni plej certe utilas al nia celo: utiligi Esperanton por la klasaj celoj de la proletariaro. Kaj laŭ mia opinio: la signo de la tempo estas la unuigita movado! Tial mi proponas, ke la kongreso elektu komisionon, kiu interrilatas kun la koncernaj asocioj pri envicigo reciproka. Kiel principan fundamenton ni rajtigas ĝin trakti sur la bazo:

"Organoj de la asocio estu: La membroj. La grupoj konsistantaj el la membroj loĝantaj en la sama urbo. La Distriktoj konsistantaj el la grupoj, kiuj prilaboras por ili facile atingeblan regionon. La oficialaj fakoj kiuj prilaboras la specialajn fakojn. La Direkta Komitato elektata laŭ ia sektora sistemo. (Al la D. K. sendas ĉiu oficiala fako ekzemple: la eldona fako, instrua fako, gazetservo ktp. po unu komitatanon.) La Ekzekutiva Komisiono. La kotizoj estas partigataj laŭbezone por la asocio kaj ĝiaj fakoj. Krom tio la grupoj rajtas postuli grupan kotizon kiel oni jam nun en ĉiuj asocioj agas. La asocio liveras al ĉiu membro jarlibron enhavantan la adresojn de la Grupoj, Distriktoj, Fakoj, Direkta Komitato, Ekzekutiva Komitato, Izoluloj. Krom tio la ĝeneralajn aferojn kiel la nuna kaj pagataj anoncoj de korespondemuloj (? Red.). La asocio liveras senpage al ĉiu membro la oficialan gazeton." La komisiono raportu pri la traktadoj en la gazeto kaj diskutigu ilin. Gesamideanoj! Ni ne perdu la tempon pro diskutado pri "internaciismo aŭ sennaciismo" kiam ni fakte vidas, ke ĉiu k-do havas la saman celon kaj nur esprimas sian ideon per alia vorto. Ĉu vi ne spertis same, demandinte k-dojn, kion ili komprenas per la esprimo: labori sennaciece aŭ internaciece, ke Vi ricevis poste samsencajn klarigojn?

Ni envicigu nin kaj envicigu ilin en la linio de la batalantoj por la libereco!

Konrad Deubler, München.

V. Kongreso de SAT

Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

sub honora protekto de la Aŭstria laborista ĉambro

6. Komuniko.

SAT-anoj!

La kongreso alproksimiĝas. La K. K. sin apogante al SAT kaj ties multnombra anaro atingis gravan sukceson. La Aŭstria laborista ĉambro akceptis la honoran protekton de nia Va. La gvidantaro de la ĉi-tiea laboristaro serioze sin okupas pri la tutmonda laborista Esperanto-movado kaj speciale pri nia Va. *Necesas* k-doj pli vigla propagando por la Wiena kongreso. Kelkaj sektoroj malgraŭ sia multnombra SAT-anaro ĝis nun ne estas reprezentataj. La K. K. alvokas vin lasthore streĉi ĉiujn fortojn, por ke la kongreso fariĝu impona manifestado de la forto de SAT.

Kongresadreso: Jos. Slezak, XX, Ospelgasse 34/25.

Kongrestagoj: 11.—15. aŭgusto.

Kongresejo: Laborista hejmo XVI.

Kongreskotizo. La simpla membrokotizo de SAT por la diversaj landoj. Senlaboruloj post atestita senlaboreco pagas la duonon.

Pago: per naciaj monbiletoj en registritaj leteroj.

Aliĝo: Validaj estas nur aliĝiloj akompanataj de la kotizo. Laŭ decido de la kongreskomitato, en interkonsento kun C. K. povas aliĝi al la kongreso ĉiu laboristo-esperantisto (ne SAT-ano). Ĉi aliĝontoj ricevos specialan kongreskarton. La aliĝkotizo estas la sama, kiel por la SAT-anoj.

Loĝigo: Por prizorgi la konvenajn loĝejojn estas necese, ke la gek-doj mendu plej eble frue la bezonotajn ĉambrojn, ĉu privatan, ĉu hotelan ktp.

Kongreseldonaĵo: La K. K. eldonas serion da poŝtkartoj ilustritaj de Wien. La prezo estas ŝ. 1.— riceveblaj ĉe k-do Jos. Slezak.

Gek-doj! Ne prokrastu la sendon de via aliĝo. Se vi mem ne povas veni, tamen subtenu nin per via kotizo.

Kongreskomitato de la V. Kongreso de SAT.

5. listo de aliĝintoj.

		Aŭstrio			
111	K-do	Fr. Ludvig,	Wien	XX	
112	„	Geidesch, Fr.,	„	XVI	
113	„	Witzmann, J.,	„	XVI	
114	„	Gangelberger, Jos.	„	XVI	4978
115	„	Pichler, Heinr.,	„	XII	
116	„	Clabian, Rud.,	„	XIII	4404
117	„	Horrath, Fr.,	„	IV	
118	„	Zidek, Leop.,	„	XIV	959
119	„	Kacimbersky, J.,	„	XIV	4683
120	„	Patka, Joh.,	„	XVI	
121	„	Viehauser, Stef.,	„	VIII	1802
122	„	Hinterberger, Fr.,	„	IX	
123	K-dino	Thaler, Sidi,	„	II	
124	„	Papik, Klara,	„	II	
125	K-do	Scheichl, Heinr.,	Salzburg		2488
126	„	Bogner, Ludw.,	„		3187
127	„	Plank, Hans,	„		1732
128	K-dino	Plank, Lina	„		5039
129	„	Hofbauer, Luise	„		2013
		Germanio			
130	K-do	Vogel, Walter,	Leipzig		174
131	„	Bässler, Otto,	„		715
132	K-dino	Lehmann, Klara,	„		913
133	K-do	Schinkel, Rich.,	„		135
134	„	Mersiovsky, W.,	„		2977
135	„	Berger, Otto,	Halle		2262
136	„	Truppe, Kurt,	„		1336
137	„	Sommer, Max,	„		4372
138	„	Janke, Ernst,	„		2678
139	„	Strauss, Rud.,	„		574
140	„	Müller, Karl,	Stuttgart		4394
141	„	Waller, Konr.,	„		4392
142	„	Nonnenmann, Herm.,	Stuttgart		511
143	„	Gottgetreu, P.,	Hannover		52
144	„	Linau, Heinr.,	Cassel		1295
145	„	Sachs, Rud.,	Düsseldorf		3749
146	„	Polle, Georg,	Dohna, Bez. Dresden		2901
147	„	Peteler Bernh.,	Frankfurt a. M.		2311
		Sovet-Unio			
148	„	Bezin, Karlo,	Orenburg		4733
149	„	Dobroĥotov, I. A.,	„		3937
150	„	Petrov Sergeo,	„		4640
151	K-dino	Ostros, Ablina,	„		
152	K-do	Nikolao Vladimiroviĉ,	Moskvo		1520
153	„	Ŝilsulman Greg.,	Ureĉje Slucka		4639
154	„	Machovsky, Serg.,	Ĵlobin		4026
155	„	Mokrecov, Gabr.,	Oranienbaum		5088
156	„	Ĉerenkov, Joh.,	Kalaĉ		4092
157	„	Bojev, Sergeo,	Turkestan		
158	„	Belakov, Baz.,	Tuapse		3935
159	„	Savĉin, E.,	Rubcovo		1131
160	„	Kazimirov, Gr.,	Kuzneck		
161	„	Telenkov, G.,	Znamenka		4637
		Estonio			
162	„	SAT-grupo	Tallinn		
		Turkio			
163	K-do	Pek, Hans,	Konstantinopel		1186
		Usono			
164	K-do	Kerr, J. M.,	Denver		1781
		Italio			
165		Arezzo			4060
166	K.do	Carbone Domen.,	Milano		532
167		Proletaria Esperanto-Grupo	Milano		1681
		Francio			
168	K-do	Desmoulieres Jules,	Marseille		5293
169	„	Tournel Elien			1255

Propono n-o XXI

La k-daro, partoprenanta la V-an kongreson de SAT en Wien, decidu sendi telegramon al Moskva registaro kun la peto, elkarcerigi ties Membron kaj revoluciulon: k-don Hajdovski, kiu estas enkarcerigita ne pro socia krimo, sed nur, ĉar li pensas antiaŭtoritate kaj internacibaze propagandas sian idealon.

SAT-ano 1528, Hochhaeuser.

Propono n-o XXII

Mi proponas transformigon de "Sennacieca Asocio Tutmonda" en pure poresperantan asocion. Konsekvence ankaŭ la titolo de l' asocio mem devas esti ŝanĝita, ekzemple: "Tutmonda Esperantista Laborista Asocio", "Esperantosocialista Asocio Tutmonda" ktp. Same ankaŭ la titolo de l' asocia organo "Sennaciulo" devas esti aliigita, ekzemple: "Esperantista Laboristo", "Tutmonda Esperantorevuo socialista" ktp.

Memkompreneble ankaŭ la statutoj devas esti komplete konformigitaj al la nova asocio kaj ŝanĝitaj laŭe. *N-o 962 Feith.*

Propono n-o XXIII

Ĉar en SAT-Jarlibro 1925 estas rimarkinde multaj adresoj de metallaboristoj kaj lignolaboristoj, ni proponas, ke oni transformu ilin el ĝenerala SAT-anaro en specialajn faksekciojn. Por ĉi tiuj sekcioj estu elektata aparta komitato, kiu prizorgas organizadon, propagandon, verkadon de profesie sciencaj artikoloj por S-ulo, S. R. kaj Jarlibro, pri teknikaj libroj kaj vortaroj ktp., por ŝarĝon forpreni de SAT-sekretariejo, kiu nur restu supera protektanto kaj kontrolanto de resumo de iliaj laboroj. *SAT-anoj de Landshut.*

Propono n-o XXIV

La kongreso elektu komisionon, kiu interrilatu kun la Laboristaj Esperanto-Asocioj en la diversaj lingvoregionoj pri envicigo kaj kunigo. La kongreso esprimas sian interkonsenton, ke laŭ principaj formoj la organoj de la asocio estos: 1. La membroj. 2. La grupoj konsistantaj el la membroj loĝantaj en sama urbo. 3. La distriktoj konsistantaj el la grupoj, kiuj pro la lokaj cirkonstancoj sukcesas pli facile interrilati kaj prilabori la koncernan regionon. 4. La oficialaj fakoj kiel ekzemple: la eldona fako, la porvarba kaj instrua fakoj, la gazeta fako, ktp. Ĉiu oficiala fako rajtas sendi po unu membro por la Direkta Komitato. La Direkta Komitato elektata laŭ ia sektora sistemo. La Ekzekutiva Komitato. La asociano rajtas: uzi la servojn de la asocio; ricevas senpage la jarlibron, la oficialan gazeton kaj kiam oficiala fako eldonas gazeton ankaŭ tiun, se ĝi koncernas liajn interesojn. La oficialaj fakoj ricevas proporcie procentojn de la asocia kotizo. La grupoj rajtas postuli grupan kotizon per kiu ili pagas la grupajn elspezojn kaj la por-distriktajn. La komisiono konigu la staton de la afero en la gazeto kaj diskutigu ĝin.

Konrad Deubler (n-o 30), München.

Propono n-o XXV

La kongreso elektas komisionon, kiu interrilatas kun ĉiuj laboristaj Esperanto-organizacioj por trovi tiun formon de internacia organizacio, kiu ebligas la aliĝon al ĉiu propaganda organizacio.

Konsekvence foriĝos la sektoroj. La direkta komitato estas elektata el la estraroj de la propag. ligoj.

Al la tutmonda organizacio nur povas aliĝi organizacioj. Unuopaj membroj nur estas akceptataj el regionoj lingvaj, kie ne ekzistas iu organizacio.

Adolf Sproeck (860), Gerhard Hinze (3218), Alfred Ziepert (4650), Willi Steinkühler (3217), Max Neugebauer (4963).

Propono n-o XXVI

Kongreso deklaru la kanton de N. Barthelmess "Al la Sennaciularo" kiel oficialan kanton de SAT-anaro.

Samtempe, ĉi-propono ne intencas nuligi "Internacion", kiel kanton oficialan por ĉiuj revoluciuloj.

K. Faddejev, SAT-ano 3717, V. Baĵenov, SAT-ano 1367, S. Trofimov, SAT-ano 3409, L. Majzlis, SAT-anino 4612, Z. Znamenskaja, SAT-anino 4611, V. Stasenkov, SAT-ano 4613.

Ĉita, (XII. Sektoro), la 9. julio 1925.

KRONIKO

Argentino

La tajlora sindikato de ĉi tiu urbo Union, Obreros Sastres, Costureras y Anexos. (U. O. S. C. A.) en sia lasta ĝenerala kunsido decidis oficialigi esperanton kiel helplingvon por siaj internaciaj interrilatoj. Ili deziras korespondi en esp-o kun similaj sindikatoj de la tuta mondo pri laborkondiĉoj kaj salajroj. Ni ankaŭ deziras ricevi gazetojn, revuojn kaj broŝurojn por nia legotablo en itala, hispana kaj esp. lingvoj. Sendu la korespondaĵon al la jena adreso:

K-do Rafael Herrero, Mar del Plata
Union O. Sastres, Costureras y Anexos
San Martin 2523 (Argentino).

Britio

Manchester. 8. julio okazis granda festo. La SAT-grupon vizitis k-do Porcin, maristo, hungariano, alveninte en haveno sur ŝipo Balaton. Renkontiĝis 20 k-doj el diversaj urboj. Post gaja manĝo k-do Elder bonvenigis nian SAT-fraton. Kun profunda intereso ni aŭskultis paroladon de k-do Porcin pri siaj spertoj kiel ruĝa soldato dum hungara revolucio. 11. julio okazis monata mitingo. Bedaŭrinde la Unua Brita Konferenco devis esti prokrastata, ĉar duono el la kamaradoj ne povus ĉeesti pro senlaboreco kaj malsaneco. La konferenco okazos en Manchester 29. aŭg. Nia SAT-grupo malrapide plukreskas. Aperis anglalingva folieto por SAT-propagando. Ni diskutas pri formo de nia landa SATpropaganda divido. La grupo tre petas ĉiujn SAT-anojn en Britio, sendi rezoluciojn por tagordo de Brita Konferenco, ĉar ni bezonas spertan helpon en nia unua entrepreno.

Francio.

Strasbourg. Antaŭ 8 monatoj en mizeraj cirkonstancoj fondiĝis SAT-grupo en Strasbourg kiu ĝis nun ne povis tiel prosperi kiel estus necese, ĉar la disvastiĝon de l'internacia lingvo forte malhelpas: 1) la indiferenteco kiu regas inter la amasoj — kiun naskis la ĝis nun iomete tolerebla ekonomia situacio. Sed nun jam la mizero ekkomencis sian kleriglaboron.

2) grave malhelpas la prosperon tiu neniam pardonebla fuŝago de kelkaj personoj per kiu ili flankigis la atentojn de l'interesuloj, eĉ fortege kompromitis la esperantistan movadon.

La cititaj aĉuloj estis gvidantoj de antaŭ 3 jare fondita Esp. Lab. Soc. (gr. de Liberiga Stelo) kiuj post 3 monata funkciado saĝe konstatis la netaŭgecon de Esp. kiel int. lingvo. Ĉi tiuj iamaj fervoruloj kontraŭbatalinte Esp-on, fondis Ido-grupon, kiu post glora senaĝeco nun agonias.

Kelkaj el la anaro de la suprenomita Lab. Esp. Soc. ankoraŭ restis fidelaj al Esp., sed ili glore burĝiĝis fondinte burĝan grupon.

La juna SAT-grupo nun aranĝos la duan kurson, fininte la unuan kie el 30 aŭskultantoj finlernis 10. Por la nova kurso la grupo faras laŭeble grandan propagandon.

Nun ni alvokas vin, diverslandaj gekamaradoj, por helpi nian movadon — kiu malfacile prosperas ĉi tie, kie ankoraŭ furiozegas la ŝovinismo — laŭ viaj povoj — per kelke da sendotaj propagandiloj, ĵurnaloj, konsiloj ktp. al la adreso de peranto: k-do 4022. *Strasburgo, II. Sektoro. SAT-ano 376.*

Germanio

Berlin, 19. julio. Ĉe la tutgermania kongreso de kompartio ĉeestis 4 Esperantistoj-SAT-anoj. Ili sukcesis aranĝi en la kadro de granda Agitprop. kaj komeldoneja ekspozicio, efikan prol.-esp. ekspozicion el SAT-, SEU- kaj LEA-literaturo, gazetoj diverslandaj, afiŝoj ktp.

La idistoj ekspoziciis kelkajn lernlibrojn kaj gazetojn malnovajn, ne en aparta angulo, sed inter alia literaturo, tute neimpreseble.

Al ĉiuj delegitoj de kongreso estis disdonitaj novaj SAT-flugfolioj germanlingvaj. La okcidentaj saksianoj proponis rezolucion pri interpacigo de kom. esperantistoj kaj idistoj, por solvi finfine la mondlingvan problemon. La kongreso decidis transdoni ĉiun materialon al Komintern. En ĉiuj partiejoj jam pendas niaj afiŝoj. En septembro ni intencas malfermi 7 kursojn esp. ĉe partiaj rondoj en Berlin.

Centra librejo de VIVA-eldonejo ekspoziciadas SAT-, SEU-, LEA-eldonaĵojn kaj gazetojn kaj komisie disvendas. Ĉe sovetia studenta unuiĝo malfermiĝas Esperanto-kurso. *Berlinano.*

Sovet-Unio

Niĵni-Novgorod. La 15. majo finiĝis la kurso por gvidantoj de Esperantaj ĉeloj. Ĝin finis 17 gekamaradoj (57% de la aŭskultantaro). Instruis k-do Konovalov. Estas projektata dua samspeca kurso. La 24. majo okazis ĝenerala kunveno de la membroj. Estis aprobita plano de laboro por somera periodo, elektitaj 3 novaj membroj por la Estraro, akceptitaj ĉirkaŭ 60 novaj membroj.

Okazis raportoj en kelkaj entreprenoj de la urbo kaj gubernio. Profesiaj sindikatoj de Sovetaj oficistoj kaj de presistoj aĉetis Esp. literaturon por siaj bibliotekoj. Dum la unuaj kvin monatoj de la jaro estis disvastigitaj en gubernio ĉirkaŭ 500 abonoj al "Esperanto Hejme".

SAT-grupo, konsistanta el 25 personoj, havis kunvenon, dum kiu estas decidite praktike utiligi Esp-on.

Tuapse (Ĉer. obl.). Dum lasta plenkunsido de prof-unuiĝoj tri raportantoj eldiris, ke ĉe Tuapsa Centra Lab. Klubo je nomo V. I. Lenin la plej laborema rondeto estas la rondeto de Esp.-lernantoj. Intereso por Esp. kreskas. *3935.*

Perŝipe de Passau al Wien!

Areto da k-doj jam anoncis sin por la veturado kaj tial la lastaj informoj antaŭ nia renkontiĝo en *Passau*:

Ĉiuj k-doj direktu la anoncojn al k-do *Georg Haas, Passau*, Auerbach n-o 7, Bavarlando. Li prizorgos la loĝejan aferon. Sabate vespere ni renkontiĝos. La ŝipo forveturos dimanĉe la 9an de aŭgusto matene je la 5a. Ĝi alvenos en Linz je 8.30 h. antaŭtagmeze kaj haltos tie 1 horon. En Wien ni alvenos vespere je la 6a kaj la Wienaj k-doj atendos nian alvenon. La kostoj por la ŝipo estas 10 ŝilingoj (6,50 germanaj markoj).

Tial ne preterlasu la okazon, la renkontiĝon surŝipan kaj komunan veturadon al Wien tra la bela pejzaĝo apud la "blua Danubo"!

Konrad Deubler, München, Arcis-str. 48/2.

KORESPONDEJO

819. La regreson en tiuj landoj kaŭzis ĉefe la ekonomiaj cirkonstancoj kaj sekva malvigliĝo en kulturaj aferoj, plue — nesufiĉa scio de la lingvo por legi la gazetojn, kaj fine — tendenc-frotiĝoj kun postsekvanta malemo.

3873. Ne surskribu duflanke la manuskripton! Tio necesigas kopion niaflanke. Pro abundo de materialo ni ne povos presigi trad. alvokon, precipe ĉar jam orig. alvokoj aperis en S-ulo pri sama afero.

S., Ekater. Temo jam pritraktita en S-ulo. Se la pensoj esprimitaj estus novaj, originalaj, mi enpresigus. Sed mi devas ŝpari lokon.

R. N., Smolensk. Viaj sendaĵoj uzotaj.

1891. Via artikolo uzota.

656. Unu tia anonco kostus 4,40 mk. Ĉe pluaj samaj anoncoj estas kalkulata 20% rabato.

Al diversaj. Viajn prilingvajn sugestojn ne ĉiujn ni povos presigi, ĉar tro amasiĝis la materialo. Tamen ni dankas al vi, ke vi esprimis vian opinion, ĉar tio ebligas nin klare prijuĝi kiel pensas la plimulto de niaj legantoj. *Red.*

RECENZEJO

Gazetoj

Represis el S-ulo: *Freiheit*, Düsseldorf, 11. 7. Vivo argumentas por ni (S. 38), *Smena*, Leningrad, 7. 7., Let. el Aŭstrio (S. 39), *Nia Vojo*, Kremenĉug, 16. 6., Pri Crouch kaj Trumb. (S. 38), *Arbeiter-Zeitung*, Mannheim, 11. 7., La ordono de l'diplomat. ktp. (S. 34) *La Vie Ouvrière*, Paris 10. 7., Kelkaj strikb. el Ĉekosl. (S. 35), *Le Libéré*, 15. 6., Vivo de lab. en Hung. (Jarl. 24), 30. 6., Vivo en Budapest (S. 14).

Työmiehs, So. Superior, 4. 7. Esp. kaj prol. liter. (S. 12), *Industrial Solidarity*, Chicago 24. 6. let. de lab.gvidantoj britaj (kompleta represo kun propra antaŭparolo) (S. 31), *L'Ecole Emancipée*, Paris, n-o 43, Crouch kaj Trumb. (S. 38), *A. Vilag*, Targu-Mureŝ, 22. 7., Stockh. pacmonumento (S. 41).

Represis el S. R.: *L'Humanité* Paris, 18. 7., La Ponto (jan. 25).

Enpresis div. artikolojn: *De Tribune*, Amsterdam 16. 7., longa art. pri SAT, *Sächsische Arbeiter-Zeitung*, Leipzig, 21. 7., art. pri nia Va kongreso en Wien.

Le Semeur de Normandie, Caën, 10. 7. varbart. de Lanty, *Olympia-Pressedienst*, 22. 7., Frankfurt, alvoko en esp.

Libroj kaj broŝuroj

Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado 1925 (UEA), 12 Bould. du Theâtre, Genève. — Form. 11×16 cm. Nur por membroj.

Entenas sur 352 paĝoj plus CXVI paĝoj da anonca teksto 1. enciklopedion kun multaj statistikoj 2. informojn esperantistajn (historio de Esp., gazetaro, ligoj ktp), 3. la adresaron de la delegitoj de UEA. — Trafoliumante la adresaron, ni kun bedaŭro devis konstati, ke ankoraŭ multaj laboristoj ne komprenis nian alvokon: "For la neŭtralismon!" kaj preferas ankoraŭ la pure-verdan „neŭtralan" movadon. Oni havas strangan senton, se oni devas legi apud la adresoj de bankdirektoroj, bienposedantoj kaj majoroj la nomojn de simplaj laboristoj. Hontinde!

La malaperinta amiko (L'ami disparu), de *Jules Thiebault*. Carignan (Ardennes). — 100 paĝoj. Havebla ĉe la aŭtoro. Prezo nemontrita.

Libro franclingva kaj esperantlingva pri "la nedaŭraj reenkorpiĝoj en Mantes", pri materiiĝintaj spiritoj kaj mediumaj eksperimentoj. Nin SAT-anojn tiu libro malmulte allogos, ĉar ni opinias, ke la tempo kaj la fortoj, kiujn oni foruzas por tiaspecaj eksperimentoj, povus esti aplikata pli utile kaj pli fruktodone. Aŭ ĉu la aŭtoro kredas, ke tia eksperimentado, tia vivigado de spiritoj valoras por la progreso de homara evoluo? *N. B.*

Ilustrat A-B-Cedarie del Lingue Medial Europan de *J. kaj B. Weisbart*, Nürnberg.

80 paĝa lernlibro de "Medial", la "eŭropa lingvo". Certe la "plej perfekta lingvo" —, almenaŭ laŭ la opinio de l'aŭtoro. Cetere sufiĉe lukse prezentita libreto kun multaj ilustraĵoj!

Historio, instruoj kaj valoro de la Bahaimovado, de *D-ro H. Grossmann*, eldonita en Hamburg. Same 8-paĝa numero de kvaronjare aperonta internacia Bahai-Esperanto-gazeto *La Nova Tago*. Ĉiujn demandojn oni direktu al red. Fr. Gerstner, *Wandsbek* (Hamburg), Ölmühlenweg 66.

Nekrologo

La 16. julio 1925 mortis post longa, suferiga kormalsano nia kara kamarado

Eugen Erk

en aĝo de 22 jaroj.

Honoran memoron! **SAT-anaro Cannstatt**

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Germanio

— K-do *Otto Franke,* Körnerstr. 17, *Oschatz i. S.* dez. koresp. pri ĉ. temoj L, PK, PI, k. ĉ. l., nepre resp.

— K-do *Martin Wunder,* Zschöllau n-o. 6, b. *Oschatz i. S.,* dez. koresp. pri ĉ. temoj L, PK, PI k. ĉ. l, ĉiam resp.

— K-do *Rudolf Pohle,* Promenade 45, *Oschatz i. S.,* dez. koresp. pri fertranĉaĵoj k. ilfabrikado, por ŝtalo k. fero, hardaĵoj por matricoj k. aliaj metilaboraĵoj. Tuj resp.

— K-do *Bernardo Schmidt,* Ludwigstr. 21, *Schweinfurt i. Bay.,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PI, k. ĉ. l.

Jugoslavio.

— K-do *Ŝtefano Ĉaklec,* Domaldova, 10, *Split,* dez. koresp. kun filatelistoj k. p. m. kolektantoj ĉiul., interŝ. PM, ĉiukvante sed nur asortitajn. Resendas samkvante k. samvalore. Nur serioze.

Sovet-Unio

— K-do *K. Rozen,* Bolŝaja Belozerskaja ul. 11, kv. 3, *Leningrad,* 21 jara, dez. koresp. pri div. temoj, pref. geografio, ŝakludo, PM.

— K-do *Bondarenko, Jurio,* ul. Rakovskogo 13, *Ĉernigov,* kun ge-SAT-anoj k. medicinaj laboruloj ĉ. landaj, L, PK.

— K-do *Tomilov Anatolo,* Uprofbjuro, *Petrovski Zavod,* Zabajk. gub., kun seriozaj k-doj pri div. temoj k. ĉ. l., interŝ. papermonon, esp.-aĵojn, fotojn. Ne sendas unua, resp. akurata.

— K-do *A. Liljer,* Brjanskaja. 15, 2, *Moskvo,* L, PI, PM, k. ĉ. l.

— K-do *M. Ivanov,* Leningradskoe ŝosse, 2 Invalidnaja, 23/2, kv. 2, Moskvo, pri radioamatoreco k. sporto k. ĉ. l.

— "Grupo esperantista de cementfabriko" "Ruĝa Oktobro" dez. koresp. pri div. temoj, interŝ. PK, PI, k. ĉ. l. Adresu al: K-do *Viktor Ŝefer, Volsk,* Sarat. gub, Cementfabriko "Ruĝa Oktobro".

— K-do *Viktor Ŝefer, Volsk,* Sarat. gub., Cementfabriko "Ruĝa Oktobro", dez. interŝ. PM, PI. Tuj resp.

— K-do *Spiridoviĉ* (ĵurnalisto), ul. Libkneĥta, 45, *Ĥarkov,* pri lab. edukado, lab. korespondado, ekonomi-politikaj k. lingvaj demandoj, L, PK.

— K-dino *A. Tomenko-Spiridoviĉ, ul.* Libkneĥta, 45, *Ĥarkov,* pri virina movado, pentrarto, turismo, moroj de loĝantaro ktp. L, PI.

ABONU AL "Sennacieca Revuo", la monata literatura organo de SAT

L A S T H O R E

Rezultoj de la baloto pri Direkta Komitato

4-persona komisiono el Leipzigaj SAT-anoj kunvenintaj 31. julio, kontrolis la voĉdonilojn resenditajn kaj konstatis la jenajn rezultojn:

Elektitaj estas k-do Borrel (1. sektoro), k-do Nicollet (2. sekt.), k-do Jonas (3. sekt.), k-do Richter (4. sekt.), k-do Petersen (5. sekt.), k-do Muribo (6. sekt.), k-do Demidjuk (7. sekt.), k-do Smirnov (8. sekt.), k-do Izgur (9. sekt.), k-do Hajrapetjan (10. sekt.), k-do Krjukov (11. sekt.), k-do Baĵenov (12. sekt.), k-do Ishiguro (13. sekt.), k-do Fukuta Kunitaro (14. sekt.), k-do Dambe (27. sekt.), k-do Barreira (28. sekt.), k-do Kerr (29. sekt.), k-do Fröding (30. sekt.), k-do Corral (33. sekt.), — ĉiuj kiel *ordinaraj D. K.-anoj.*

Elektitaj estas k-do Oliveras (1. sekt.), k-do Roux (2. sekt.), k-do Rasztoszky (3. sekt.), k-do v. d. Heid (4. sekt.), k-do Müller (5. sekt.), k-do Sheriff (6. sekt.), k-do Dmitriev (7. sekt.), k-do Lidin (8. sekt.), k-do Kolĉinski (9. sekt.), k-do Krassovskij (10. sekt.), k-do Haritonov (11. sekt.), k-do Trofimov (12. sekt.), k-do Kuraĉi (13. sekt.), k-do Buchmann, (30. sekt.), k-do Barrot (33. sekt.) — kiel *ekstraj D. K.-anoj.*

Partoprenis la voĉdonadon 400 k-doj.

Nevalidaj estis 122 voĉdoniloj.

En la sektoroj, kie kandidatis du kamaradoj, k-do Jonas (3. sekt.), ricevis 204 voĉojn (Stöber 74 voĉojn), k-do Fröding (30. sekt.) 170 voĉojn (k-do Weder 108 voĉojn).

UNS

PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT

E. G. M. B. H.

PRESEJO KAJ ELDONEJO

Liveras ĉiujn kurantajn preslaborojn: katalogojn, broŝurojn, verkojn, ĵurnalojn, gazetojn ktp., en ĉiuj eŭropaj lingvoj laŭ plej moderna stilo kaj post. akurata limtempo. La Esperanto-fako sub gvidado kaj kunlaborado de spertaj fakuloj estas unuaranga en la metio

LEIPZIG-CONNEWITZ, ELISENSTRASSE 163

TELEFONO 35622 KAJ 36239 // TELEGRAM-ADRESO: PRODUKTIV LEIPZIG // BANKKONTO: LEIPZIGER CREDITBANK, GIROKASSE LEIPZIG // POŜTĈEKKONTO, LEIPZIG N-O 67921

UNS-BÜCHERSTUBE LEIPZIG

KARLSTRASSE I ∘ TELEFONO 29409

Tenas konstante riĉhavan provizon de literaturo en germana lingvo. Zorga havigo de fremdlingvaj verkoj. La pozicio de Leipzig kiel kvazaŭa monopolo de l'librokomerco ebligas la rapidan liveradon de ĉiuspeca literaturo en ĉiuj lingvoj

PETU OFERTON! PETU KATALOGON!

Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas — Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.
Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 40 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr; ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 40 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 50 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej. **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ 1/4 jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG